

(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361

6

1994

中國報道

EL POPOLA

ĈINIO





Peonio

Foto de LIU SIGONG

INTERNI

Interesaj artikoloj

Mi ricevis la unuan numeron de 1994 kaj la dekduan de 1993 de "El Popola Ĉinio", kiuj same kiel la antaŭaj entuziasmigis min ĉiun monaton. Belegaj fotoj, ŝatindaj rubrikoj, facila legado ktp. Mi tre dankas vin pro tiu superba revuo.

Sed ĉefe interesis min la artikolo "Mao Zedong kaj la Yan'an-a Esperanta Ekspozicio", kiu memorigis al mi la foton, faritan en 1965, de mia lasta filo Frederik en blua pantaloneto kaj blanka ĉemizo.

MARTIN MICHEL
(Francio)

La raporto pri la japana kongreso precipe plaĉis al mi. S-inon Tan Xiuzhu (Tan Ŝiŭĝu) kaj s-inon Rozo mi tuj rekonis sur la fotoj, ankaŭ s-ron Takeuti.

La artikolo por komencantoj "Novjara Karto" estas tiom bele verkita, ke mi preskaŭ ploris, traleginte ĝin. Mi jam kopiis ĝin en nia lernejo por sendi ĝin al miaj amikoj, kiuj ŝatas tiaspecajn artikolojn.

JOSEF KONDOR
(Germanio)

Mi estas abonanto de via revuo kaj ricevis ĝin ekde aŭgus-

to 1993. Nun mi legis la tabelon de enhavo de la jaro 1993 kaj konstatis, ke en la aliaj eldonoj de tiu jaro estas kelkaj artikoloj, kiuj tre interesas min. Min interesas speciale artikoloj pri la politika kaj ekonomia situacio kaj disvolvigo en via lando. Mi vivas en la eksa GDR kaj tie ankaŭ kiel en Sovetunio kaj la aliaj eŭropaj socialismaj ŝtatoj socialismo malsukcesis. Tial estas por mi tre interese koni, kiel vi en Ĉinio nun konstruas la socialisman socion pere de la socialisma merkata ekonomio kaj sub la gvido de la Komunista Partio.


KURT NOBST
(Germanio)

ENHAVO

- 2 *INTER NI*
- 4 Por plibonigi la staton de la ĉinaj infanoj
- 6 Koopera sistemo de akcio en la ĉina kamparo
- 8 Aplikado de spaca telemetrio en Ĉinio
- 10 Patrina amo
- 11 Jubilea urbo, jubilea kongreso
- 12 Ĵelezo, magneto de la ĉina E-movado
- 14 Funebra saluto al Ĵelezo
- 16 *ESP-NOVAĴOJ*
- 17 *POR KOMENCANTOJ:*
Valoraj heredaĵoj
- 20 *ĈE YANGZI-RIVERO:*
Ŝtala urbo kaj riza bazaro
- 24 Kapornamoj de tu-aj virinoj
- 25 *ARTOJ DE ĈINIO:*
Situ Zhaoguang kaj liaj skulptaĵoj
- 28 Promenado en la Monda Parko de Pekino
- 29 *SUR STRATOJ:*
Ĉirkaŭ la Imperiestra Palaco
- 32 *FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:*
Kampanoj-laboruloj en urboj
- 36 *ĈINA KULTURO:*
Lando poezia
- 38 Arkeologiaj eltrovoj en Tibeto
- 40 Privataj lernejoj leviĝantaj
- 44 Por purigi Suzhou-riveron
- 46 *SENTENCOJ DE FILOZOFOJ:*
Jia Yi pri vivo kaj morto
- 46 *MEM PROVU*
- 47 *EL ĈINAJ GAZETOJ*
- 48 *KURANTAJ AFEROJ*
- 50 *AMATOROJ:*
Kolektanto de moneroj
- SUR LA KOVRILO:*
Ĵelezo, honora prezidanto de ĈEL kaj honora membro de UEA
- 2 Peonio
- 18 En infanĝardeno
- 34 Familia orkestro
- 42 Tetrinkejoj en Chengdu
- SUR LA DORSKOVRILO:*
La ŝtonkavernaro Maijishan

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Wenzhou (p. 6)
2. Nanhai (p. 6)
3. Laiyang-gubernio (p. 6)
4. Tibeta Aŭtonoma Regiono (p. 38)
5. Yantai (p. 10)



POR PLIBONIGI LA STATON DE LA ĈINAJ INFANOJ

ANTAŬ nelonge, kunlabore kun la Infana Fonduso de UN, la ĉina registaro faris inter 620 000 infanoj 14-jaraj el 570 000 familioj de 29 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio esploradon pri la vivmedio, naskiĝo, morto, planizita imunigo, nutrostato, edukiteco, saneco kaj patrino. Per tio oni akiris riĉajn materialojn kaj datenojn.

Surbaze de la esploro, la oficistoj de la fonduso opiniis, ke en la pasintaj 40 jaroj Ĉinio multe plibonigis la staton de infanoj. La mortokvanto egalas al tiu averaĝa de la evoluintaj landoj. Ili taksis la nutrostaton de la ĉinaj infanoj kaj diris, ke la efektiva atingo estas je 8% pli alta ol la atendata, kaj rilate al edukado ili montris, ke la efektiva atingo estas je 35% pli alta ol la atendata.

Estas konate, ke en la malnova Ĉinio la infanoj estis multe atakataj de diversaj katastrofoj. Tiam la mortokvanto de infanoj estis terure granda, tra la tuta lando la sanprotekta kaj eduka laboro por infanoj estis malvigla.

La nova Ĉinio enlistigis la klaŭzojn pri infanprotekto kaj deviga edukado en sian konstitucion. Ĝi plenergie disvolvas la infanan aferon, kion montras la ĉi-foje publikigitaj datenoj. Ekz., en la lastaj 30 jaroj la infana mortokvanto malkreskis je 11.86%.

Nun en Ĉinio sane kreskas 300

milionoj da infanoj, kio rezultas el jenaj faktoroj. Unue, la socia kaj hejma medio, en kiu ili vivas, estas relative stabila. Laŭ la censo farita en 1990, la elcento de eksedziĝo en Ĉinio estis nur 0.59%. Plejparto de la ĉinaj infanoj vivas en harmonia familio. La senhejmaj infanoj ĝenerale estas helpataj de la socio. Kaj bonstatigaj organizoj adoptas ĉ. 100 000 infanojn kriplajn kaj orfajn.

La progreso de la infana sanprotekta afero estas unu el la gravaj faktoroj. En la lastaj dek jaroj estis konstruitaj naŭ infanaj hospitaloj. En 1990 estis 3 100 virinaj kaj infanaj sanitaraĵoj kaj hospitaloj en Ĉinio. La sanitara servo inkluzivas sanprotekton de nov-

naskitoj, gvidadon de ilia nutrado, monitoradon de ilia kreskado kaj taksadon de ilia psikologia konduto. Pli ol 97% de la 1-jaraj ĉinaj infanoj ricevis injektadon de kvar specaj imunaj vakcinoj, kia Calmette-Guerin.

Laŭ esploro farita en ĉinaj urboj, la 6-7-jaraj infanoj estas pli pezaj meze je 0.4 kg kaj pli altaj meze je 1.8 cm ol la samaĝaj infanoj antaŭ dek jaroj. Cetere, la mortokvanto de malpli-ol-5-jaraj infanoj estas mezgranda, kompare kun tiu de aliaj landoj.

Laŭ la censo farita en 1990, 85% de la 7-14-jaraj ĉinaj infanoj vizitas lernejon, kaj pliboniĝas la kondiĉoj de elementa lernejo. Pli kaj pli vigliĝas la porinfanaj ekonomiaj kaj

En novtipa akuŝĉambro de Pekino





Novnaskitoj

kulturaj aktivadoj. Pli boniĝas la fabrikado de porinfanaj varoj kaj servoj. Nun ĉiujare aperas 150 milionoj da ekzempleroj da porinfanaj gazetoj, kaj 200 milionoj da ekzempleroj da porinfanaj ĵurnaloj. Ĉinio estas unu el la kvar landoj, kies 80% de infanoj povas fini kvinaklasan lernadon en elementa lernejo, sub la kondiĉo de pokapa jara naciprodukta valoro de malpli ol 1 000 usonaj dolaroj.

Ĉinio energie laboras por protekti la sanon de novnaskitoj. Antaŭ ĉio, ĝi pledas por patrina mamnutrado, ŝlosila por la sano de novnaskitoj. Antaŭ nelonge, la Monda Sana Organizo, surbaze de scienca esploro, konkludis, ke sen patrino mamnutrado ĉiujare la mortokvanto de malsanaj novnaskitoj pliiĝos je 1.5 milionoj en la mondo. La praktiko pruvis, ke patrino lakto estas la plej bona manĝaĵo de novnaskitoj.

En la 50-aj jaroj patrino mamnutrado estis tre populara en Ĉinio. Estis nature, ke la bebo denaske sučas lakton de sia patrino. Poste pro multiĝo de specoj de manĝaĵoj, precipe de laktaĵoj, kaj plie, pro manko de scioj pri la graveco de

akuŝ-hospitalo, sanprotektan propagandon k.a. En 1988 estis publikigita la "Regularo pri Protekto de Laboristinoj" kaj difinis, ke la akuŝintino ĝuas 90-tagan libertempon (56 tagoj antaŭe), la mamnutranta patrino havas tempon por mamnutrado dum sia laboro kaj oni devas havigi mamnutran ĉambron tie, kie estas multe da laboristinoj. En majo 1990 la Ministerio de Publika Sano de Ĉinio decidis, ke la 20-a de majo ĉiujare estos la "Tutlanda Tago por Propagandi Patrino Mamnutradon". Novembre de 1991 okazis simpozio pri patrino mamnutrado en Ĉinio, kio antaŭenpuŝis la infan-protektan aktivadon en Ĉinio.

Je la komenco de 1992, laŭ la postulo de la Monda Sana Organizo Ĉinio starigis noytipan akuŝ-hospitalon. En ĝi anstataŭ la tradicia kutimo, ke la novnaskito kaj ĝia patrino ne loĝas kune kaj la patrino mamnutras ĝin nur en difinita tempo, oni instigas la patrinon loĝi kune kun sia novnaskito kaj mamnutri ĝin laŭeble frue kaj laŭ ĝia bezono. 21 hospitaloj, kiel la Pekina Ginekologia kaj Obstetrika Hospitalo kaj Hospitalo Xiehe

(Ŝjehe), fariĝis la unuaj tiaj hospitaloj de Ĉinio. La Pekina Ginekologia kaj Obstetrika Hospitalo aĉetis novajn instalaĵojn kaj rekonstruis la ĉambrojn por patrinoj kaj beboj. Samtempe, la laborantoj de la hospitalo ricevis sisteman trejnadon por flegi novnaskitojn kaj bone servi al virinoj antaŭ kaj post ties akuŝo. Fine de 1992, oni asertis post juĝado, ke la hospitalo atingis la internacian normon en ĉiuj siaj laboroj.

De 1980, kunlabore kun la Infana Fonduso de UN kaj Monda Sana Organizo, Ĉinio faris esploradon pri patrino mamnutrado, inkluzive kunlogadon de patrino kaj ŝia novnaskito en

(Ŝjehe), fariĝis la unuaj tiaj hospitaloj de Ĉinio. La Pekina Ginekologia kaj Obstetrika Hospitalo aĉetis novajn instalaĵojn kaj rekonstruis la ĉambrojn por patrinoj kaj beboj. Samtempe, la laborantoj de la hospitalo ricevis sisteman trejnadon por flegi novnaskitojn kaj bone servi al virinoj antaŭ kaj post ties akuŝo. Fine de 1992, oni asertis post juĝado, ke la hospitalo atingis la internacian normon en ĉiuj siaj laboroj.

Nemalmultaj hospitaloj aranĝis malsamgradajn akuŝĉambrojn laŭ malsamaj bezonoj. En tia akuŝĉambro loĝas kun sia bebo ne nur la patrino, sed ankaŭ la patro. Kvankam oni devas multe elspezi por loĝi en tia ĉambro, tamen tio indas por junaj geedzoj, ĉar ili havas nur unu infanon dum la vivo laŭ la postulo de naskolimigo. Tial tiaj akuŝĉambroj estas tre bonvenaj.

La starigo de tia hospitalo fakte estas reformado por pediatrio, obstetiko kaj ginekologio. Kiel la unua reformado inter la pli ol 100 fakoj de Ĉinio tiurilate, tio akcelos la disvolviĝon de la ĉina higiena afero.

Laŭ statistiko, nun 94 disvolviĝantaj landoj kaj 14 evoluantaj landoj konstruis sume 767 tiajn hospitalojn, inter kiuj 207 troviĝas en Ĉinio. Ĉinio planis, ke la nombro de tiaj hospitaloj atingos 1 000 en 1995 kaj 80% de la ĉinaj novnaskitoj havos lakton de sia patrino en 2000.

La ĉi-foja esplorado montris ankaŭ la mankojn de la ĉina infana afero. Ankoraŭ ekzistas granda diferenco inter urboj kaj kamparo tiuflanke. Ekz. 74.8% de la infanoj en la urboj ricevis planizitan imunigon, sed en la kamparo nur 49%. La kreskado de la ĉinaj infanoj, precipe de la kamparaj infanoj estas malpli bona, ol tiu de aliaj landoj. En Ĉinio nur 31.8% de la 3-5-jaraj infanoj povas ricevi antaŭlernoagan edukadon, kaj relative serioza estas la problemo pri devigita ĉesigo de lernado. Ĉio ĉi tio montras, ke por ŝanĝi la staton la ĉina registaro devas fari ankoraŭ pli grandan penadon. ■

Koopera sistemo de akcio en la ĉina kamparo

EN 1983 kamparanoj de la vilaĝo Zhoucun en Shandong-provinco el-laboris kontrakton pri akcio, kio povas esti rigardata kiel senprecedenca provo de la ĉinaj kamparanoj praktiki la kooperan sistemon de akcio en la ĉina kamparo. Nun en la kamparo estas 980 000 entreprenoj de la kooperata sistemo de akcio, kun 8.14 milionoj da laborantoj kaj produktov valoro de 72.7 miliardoj da juro en 1993.

LA FENOMENO DE ZHOUCUN-VILAĜO

Antaŭ 15 jaroj en la ĉina kamparo ekpraktikiĝis la familia respondeca sistemo de laŭkontrakta produktado. La kamparanoj estis liberigitaj de la kateno de la tradicia planizita ekonomio kaj montris sian grandan aktivecon en produktado. Kaj la rapida disvolviĝo de vilaĝaj entreprenoj plivigligis la kamparan ekonomion kaj kondukis la kamparanojn al la vojo de riĉigo.

Tamen la disvolviĝo de la kampara ekonomio kaŭzis novajn problemojn. Ekzemple, la tero, kiu apartenas al kolektivo, povas esti kulturata laŭ kontrakto, sed la kapitalo, instalaĵo kaj aliaj riĉaĵoj, kiuj apartenas al kolektivo, ne rajtas esti administrataj laŭ la familia respondeca sistemo, des malpli forkonsumitaj, precipe por la regionoj, kie la kampara ekonomio havas solidan bazon kaj la kolektiva akumulo grandiĝas jaro post jaro. Tial, por profundigi

la reformadon de la sistemo de kampara ekonomio, antaŭ ĉio, necesas determini la rilaton de proprieto kaj fari la kamparanojn rektaj posedantoj de la kolektiva havaĵo. Ĝuste en tiu cirkonstancaro estiĝis en la ĉina kamparo kooperata sistemo de akcio.

Por praktiki la kooperan sistemon de akcio, necesas difini la rajton de akcio laŭ la primitiva origino de havaĵo kaj doni la rajton al kolektivo, kamparana familio kaj laboristoj de vilaĝa entrepreno. Tiel la proprieto fariĝas des pli klara sub la kondiĉo ne ŝanĝi la naturon de entrepreno. La kamparanoj nomas tion akcia kooperato por distingi la sistemon disde kolektiva entrepreno kaj akcia sistemo en larĝa senco. La fenomeno de Zhoucun-vilaĝo, alinome kooperata sistemo de akcio en la kamparo, estas kadre de la supre dirita kategorio de la sistemo.

LA MODELO DE WENZHOU

Alian specon de la sistemo karakterizas, ke iuj entreprenoj administrataj de familio kaj kunigitaj familioj aŭ kune de individuoj transformiĝas en tiujn de la kooperata sistemo de akcio. Tio estas vidata preskaŭ ĉie en la vilaĝoj de Wenzhou, Zhejiang (Ĝeĝiang)-provinco. En la reformado kaj por-domalfermo la kampara ekonomio de Wenzhou iom post iom formis novan strukturon kun familia produktado kiel la unuo kaj fakaj merkatoj de vestoj, butonoj k.a. kiel la ligilo. Post sia primara akumuliĝo de kapitalo la malgrandskala meti-produktado urĝe bezon-

is fariĝi kompare grandskala, altnivela kaj profitdona. Nature, produktado de disaj familioj estis mal-facile ekzisti kaj disvolviĝi en la ŝanĝigema merkata konkurenco. Sekve tieaj kamparanoj komencis novan provon, ke pluraj familioj kun siaj akcioj faras kunigitan entreprenadon. En Wenzhou la kooperata sistemo akcentas kuman laboradon kaj la akcia sistemo la centriĝon de kapitalo, tiel ke ne nur konserviĝis individua aktiveco en entreprenado, sed ankaŭ disvolviĝis la supereco de produktada organizaĵo. Nun tie funkcias 24 000 entreprenoj de la kooperata sistemo de akcio, inter kiuj estas 17 800 industriaj. La jara produktov valoro de la industriaj entreprenoj atingis 8.86 miliardojn da juroj, t.e. 48.5% de la totala produktov valoro de industrio de Wenzhou. Tio montras, ke la entreprenoj de la kooperata sistemo de akcio ludas gravan rolon en la ekonomia disvolviĝo de la loko.

Tiuj entreprenoj estas vivecplenaĵoj, ĉar ili havas racian organizadon: mem prepari kapitalon, memvole kuniĝi kaj mem kovri profiton kaj perdon. Kaj plie, ili naskiĝis ne laŭ plano de la registaro, sed laŭ la elekto de entrepreno konforme al merkata organizadismo, precipe al la prezsignalo de la merkato, por plejble raciigi la dispozicion de riĉfontoj kaj partopreni en la merkata konkurenco.

ALIA REVOLUCIO

La kooperata sistemo de akcio multe diferencas de la normigita sistemo de akcio. Iasence, ĝi estas

kreaĵo de la ĉinaj kamparanoj kaj pli taŭgas por la ĉina kamparo.

La kooperativa sistemo de akcio estas reformado por la administra sistemo de tero kaj ankaŭ provado en la profunda reformado de la ekonomia sistemo de la ĉina kamparo. En iuj vilaĝoj de Guangdong-provinco kamparanoj prenas uzrajton de tero kiel akcion, ricevas dividendon kaj koncentras la kulturadon, kun dezirata efiko. Post kiam la kamparanoj de la urbeto Luocun en la urbo Nanhai prenis sian teron kiel akcion, la tero estis dividita en parcelojn agrikulturan, industrian kaj komercan, kio akcelis la disvolvigon de ekonomio.

La klara aparteno de tero proprieto ege stimulis la aktivecon de la kamparanoj. En ekspluatado de dezerta monto kamparanoj de vilaĝo en Shandong prenis la dezertan monton kaj teron kiel kolektivitan akcion, sian laboron kaj liberan kapitalon kiel individuan akcion, por kultura fruktarbojn. Estis klara difino: Kiu multe ekspluatas, tiu ricevos multe da re-

donita interezo de akcio. Dank' al la difino, la antaŭa dezerta monto fariĝis 67-hektara kultivejo de fruktarboj.

La kooperativa sistemo de akcio puŝis la kamparanojn al nova sistemo de la merkata ekonomio. Forlasinte la kutimon kultura nur grenplantojn sen zorgi pri vendado de greno, la kamparanoj de Ningdu, Jiangxi(Ĝjangŝji)-provinco, partoprenis en komercado per greno. Ili funkciigas 108 grenfirmaojn de kamparana akcio kun kapitalo kaj instalaĵoj kiel akcioj. La firmaoj okupiĝas pri aĉetado, prilaboro kaj transporto kaj ricevas dividendon laŭ siaj akcioj. En 1993 ili prilaboris kaj vendis 75 milionojn da kilogramoj da greno, duone kiom de la totala kvanto de la var-greno de la gubernio. Kaj ĉ. 10 000 kamparanoj okupiĝis pri vendado de greno.

Dank' al la kooperativa sistemo de akcio, oni kolektas liberan kapitalon kaj plialtigas la sintezan povon de la agrikulturaj riĉfontoj. Iuj kamparanoj en Laiyang de Shandong uzis la teknikon de vin-

tra kulturado de legomoj en varmodomo kaj rapide riĉiĝis. Konstruado de varmodomo bezonas penigan laboron kaj investon de 8 000 juanoj. Ne eblis tion fari por multaj kamparanoj. Post kiam ekpraktikiĝis la kooperativa sistemo de akcio, tieaj kamparanoj kolektis 1.1 milionojn da juanoj kiel akciojn kaj fondis kooperativon speciale por kultura karajn legomojn, kiuj nun havas grandan debiton.

En Ĉinio disvolviĝas ankaŭ forstejoj kaj bredejoj de akcia kooperativa sistemo. Taksante la supre diritajn entreprenojn, iu influhava ekonomikisto diris, ke la entreprenoj disvolviĝas laŭ leĝo de la merkata ekonomio kaj la laboristoj kaj oficistoj estas kaj laboruloj kaj akciuloj. Tial ili pli aktive partoprenas en administrado kaj havas des pli grandan devokoscion, estante mastroj de entrepreno. En la 80-aj jaroj aperis en la ĉina kamparo la familia respondeca sistemo de laŭkontrakta produktado kaj en la 90-aj jaroj en ĝi iros la dua revolucio, t.e., praktiki la kooperativan sistemon de akcio. ■

ANONCOJ

Internacia Junulara Semajno (15-21. 07. 1994.) okazos en Kőszeg, en belega hungara urbeto apud la limo Austra. La urbo havas mezepokan etoson, kiun la renkonto deziras foruzi. Ni deziras, ke IJS okupu sian lokon en la vivo de Esperanta kaj hungara kultura vivo, tial ni organizas multajn kulturajn programojn pri hungaraj kaj esperantaj tradicioj.

Ne mankos la kutimaj koloraj amuzaj programoj: balo, ludoj, diskotekoj kaj sportprogramoj. Ni organizas migradon en la apuda belega montaro, kiu estas turisma centro en Hungario.

La ejo estas bone atingebla per trajno el Budapeŝto kaj Graz. La prezoj estas 150-240 DEM depende de la devenregiono kaj la servoj. Petu nian aliĝilon!

Internacia Junulara Semajno, H-8901 Zalaegerszeg, pk. 263. Hungario.

Telefakso: Baksa József(IJS)+36-92-369-010.

Hungara Esperanto-Junularo

FRUSOMERA RENKONTIĜO kun EGA ŜANCO por viziti Olŝtinon kaj ĝian ĉirkaŭaĵon; por kunloĝi ĉe lokaj gesamideanoj; por ĉeesti Esp-balon kaj aliajn E-aranĝojn kaj gajni orajn juvelaĵojn (kiel premiojn) en GRANDA KVIZO

Petu tuj informojn al:

S-ro GIELERT Andrzej, 10-684 OLSZTYN 13, skr. poczt. 861, Pollando

Aplikado de spaca telemetrio en Ĉinio

LA 23-an de julio 1972, surbaze de meteosatelito Usono lanĉis la unuan telemetrian sateliton por esplori riĉfontojn de la tero. La telesondilo en la satelito sondis la karakterizaĵojn de la elektromagneta radiado de objektoj sur la tero kaj sendis la donitaĵojn al la terstacio, por ke ĉi tiu traktu kaj distingu ilin laŭ la ondospektraj karakterizaĵoj de diversaj substancoj, tiel ke klariĝos la karakterizaĵoj kaj dispozicioj de riĉfontoj. Tio ludos gravan rolon por ekspluati riĉfontojn kaj disvolvi la nacian ekonomion. En la pasintaj 20 jaroj Usono, eks-Sovetunio, Eŭropa Spac-agentejo kaj Japanio lanĉis telemetriaĵajn satelitojn. Nun spaca telemetrio fariĝis grava alttekniko en la mondo.

Por kuratingi la nivelon de monda alttekniko, en 1986 estis starigita la Ĉina Terstacio de Telemetria Satelito (ĈTTS), la ununura internacie avangarda kaj kompleta sistemo de telemetrio en Ĉinio kaj grava teknika projekto enkondukita de la Ĉina Akademio de Sciencoj laŭ la Scienc-teknika Kunlabora Interkonsento de Usono kaj Ĉinio. ĈTTS estas unu el la dekkelkaj terstacioj funkciantaj en la mondo.

ĈTTS konsistas el terricevejo,

traktejo de datenoj kaj traktejo de optikaĵoj.

La terricevejo situas en Miyun-gubernio 100 km for de Pekino kaj havas parabolajn antenojn kun diametro de 10 metroj. La anteno povas ricevi optikajn donitaĵojn senditajn de tersatelito (alinome telemetria satelito por esplori riĉfontojn de la tero) de Usono kaj ankaŭ donitaĵojn senditajn de la satelito JERS-1 de Japanio kaj la satelito ERS-1 de la Eŭropa Spac-agentejo. Ĝi povas ricevi donitaĵojn de 80% de la ĉeftero de Ĉinio.


La laboratorioj por trakti kaj distribui donitaĵojn kaj optikaĵojn troviĝas en Pekino kaj provizas pli ol 400 ĉinajn telemetriaĵajn fakojn kaj ĉinajn kaj alilandajn telemetriaĵajn fakulojn per donitaĵoj senditaj de telemetria satelito. Tiuj ĉi donitaĵoj senditaj el la kosmospaco kun distingivo de 30 metroj ebligas sisteman kaj ĉiuflankan observadon de la tero kaj larĝigas la vidkampon de videblaj lumoj ĝis infraruĝaj kaj eksterinfraruĝaj radioj, kio multe riĉigas la konadon de la tero. Pro siaj granda amplekso, sintezeco, intuicio kaj ripeto la observado estas vaste uzata en agrikulturo, forstokulturo, geologio, petrola industrio, akvoutiligo, mara ekspluato, urba konstruado, mediprotek-

to kaj turismo, kun granda profito.

En 1987 okazis grandega incendio en primitivaj arbaroj de la Granda Xing'an-montaro de nordorienta Ĉinio. Dum la fajroestingado ĈTTS ricevis multe da bildoj pri la incendio en tago kaj nokto, per ili observis la incendion kaj ĝustatempe informis al la Centra Kontraŭfajra Komandejo de Ĉinio la precizan geografian koordinaton de la fajrofronto kaj la tendencon de la fajro. ĈTTS la unua certigis, ke la fajro en la orienta parto estas apartigita per detranĉa zono, kaj donis gravan bazon por kontraŭfajra komando. La satelitaj bildoj pri la tuta incendio produktitaj de ĝi havas gravan valoron por taksado la seriozecon de la incendio, ellabori projekton de rekonstruado kaj observi la ekologian ŝanĝiĝon de la loko. En la sinsekvaj kvar jaroj post la katastrofo, surbaze de satelitaj donitaĵoj, ĈTTS konstatis post analizo, ke arboj en la negrava fajrejo rekreskas rapide kaj en la grava fajrejo apenaŭ vidiĝas arboj, sur suna montodeklivo okazis grunda erozio kaj sur sensuna montodeklivo ekkreskis arbedoj. Tio havis gravan signifon por ellabori projekton cele rekonstrui la regionon serioze atakitan de la incendio.

En 1991 okazis inundo en multaj regionoj de Ĉinio. Iuj lokoj estis grave inunditaj. Per satelitaj bildoj ĈTTS atente observis la inundan situacion en la basenoj de Yangzi-rivero, Flava Rivero, Huaihe-rivero kaj Songhua-rivero kaj sendis ties satelitajn bildojn al la Ŝtata Kontraŭinunda Komandejo de Ĉinio. ĈTTS faris analizon, mezuradon kaj taksadon pri la inunditaj areoj kaj seriozecon de la katastrofo en la grave inunditaj regionoj. Tio multe helpis al konado de la preciza inunda situacio kaj al ellaborado de la politiko kontraŭ la inundo.

Kiel ĉefa ŝtata scienc-teknika konstruo, la esplorado de la inundo de la Kampoŝirma Forstarejo



Ricevo de satelitaj donitaĵoj

nordorienta, nordokcidenta kaj norda Ĉinio, etendiĝanta tra dekkelkaj provincoj, kaj la vasta Leŭsa Altebenaĵo en nordokcidenta Ĉinio por starigi sintezan reguligan projekton estis finita kun helpo de satelitaj bildoj liveritaj de ĈTTS, grandskalaj aerfotoj kaj telemetria analizado. Dank' al ĈTTS, oni havis sciencan bazon por plua konstruado de la kamposirma forsto kaj sinteza reguligo de la Leŭsa Altebenaĵo.

Kun helpo de satelitaj bildoj en skalo de 1:50 000, la granda ŝtata farmejo sur la vasta Sanjiang(Sangĵiang)-ebenaĵo de nordorienta Ĉinio finplenumis esploradon de ter-utiligo kaj irigaciado, klasifikis la teron laŭ grunda konsisto kaj taksis la produktokvanton de agrikulturaj plantoj. Tio ŝparigis multe da mono kaj tempo.

Ekde 1987, en la Delto de Perlo-rivero en suda Ĉinio oni observis la disvolviĝon de urboj,

konstruadon de vojoj, utiligadon de tero kaj sedimentadon de sablo ĉe la enfluejo de Perlo-rivero, uzante satelitajn bildojn liveritajn de ĈTTS. Ĉio ĉi tio bone efikis por starigi projekton por racia utiligo de tero kaj mediprotekto.

La Flava Rivero, la dua granda rivero de Ĉinio, trafluas la Leŭsan Altebenaĵon kaj enfluas en la Flavan Maron, kunportante grandan kvanton da sablo, tiel ke ĉi tiu sedimentas ĉe la enfluejo kaj la Flava Rivero etendiĝas al la maro unu kilometron ĉiujare. Teknikistoj de Shengli-olekampo proksime de la enfluejo trovis per satelitaj bildoj, ke la antikva vojo de la Flava Rivero estas apud la malprofundaĵo kun rezervo de nafto. Ili devigis la Flavan Riveron enflui en la maron per la antikva vojo. Kelkajn jarojn poste, la antaŭa malprofundaĵo teriĝis pro sablosedimento. Anstataŭ submara petrol-ekspluatado, oni faras la surteran, per kio oni

ŝparis 500 milionojn da juanoj.

La Ministerio de Geologio kaj Mineralogio de Ĉinio uzis satelitajn bildojn en serĉado de orminejo. Tiamaniere oni trovis 22 eblajn orminejojn nur en Sichuan-provinco. Post fizikakemia ekzameno 20 el ili estis konstatitaj kiel produkitejo de oro. Tio montris, ke spaca telemetrio havas grandan valoron ankaŭ en ercoprospektorado. Ĝis nun, ĈTTS provizis fakojn de geologio, petrolo kaj neferaĵoj metaloj per satelitaj bildoj ampleksantaj duonon de la teritorio de nia lando.

En 1993, per satelitaj donitaĵoj, ĈTTS observis la konstruadon de vojoj, verdigon kaj ŝanĝigon de varm-insula efekto kaj akvosurfaco de Pekino en la pasintaj dek jaroj. Oni trovis, ke la verdigita areo pliiĝis je 15%, akvosurfaco je kvaroblo, varm-insula efekto evidente reduktiĝis kaj vivmedio de pekinanoj daŭre pliboniĝis. Krom Pekino, ankaŭ aliaj malfermitaj urboj, inkl. de urboj en la specialaj ekonomiaj regionoj, aplikas satelitan telemetron en projektado de sia disvolvigo. Ekz., por disvolvi turismon kaj konstrui vojojn, Xiamen (Ŝjamen) de Fujian(Fuĵjan)-provinco eldonis turisman mapon, referencante satelitajn bildojn.

Nun spaca telemetrio rapide penetras en ĉiujn kampojn de la ĉina ekonomio, influas ĉiujn flankojn de la popola vivo kaj estas multe atentata de registaraj departementoj kaj fakuloj. ĈTTS povas ricevi satelitajn donitaĵojn en spaco de radiuso de nur 2 600 km kun Pekino kiel la centro. Ĝi ne ampleksas la grandan parton de Tibeto kaj Xinjiang (Ŝingĵang). La ĉina registaro planas konstrui alian terstacion de telemetriaa satelito en okcidenta Ĉinio en la proksima estonteco. ■

*Pan Xizhe (Pan Ŝjiĝe) estas estro de ĈTTS.

Patrino amo

“ONI sopiras al sia patrino en soleco. En la lernejo mi ofte sentas fortan deziron revidi vin kaj voki vin panjo, tiam mia koro pleniĝas de varmo kaj amo, kaj enuo kaj ĉagreno estas forpelitaj.”

Tio estas paragrafo de la letero skribita de Yu Xiping (Ju Ŝinping), lernanto de la Jilin(Ĝjilin)-a Profesia Lernejo por Orfoj, al la patrino Xiulan (Ŝiulan). Eble vi miras: “Kial orfo havas patrinon?!”

Yu Xiping venis de la Ĉina Internacia SOS-vilaĝo de Yantai, Shandong-provinco. La vilaĝo fondiĝis antaŭ 8 jaroj. Tie 23 fraŭlinoj donis sian ĵurpromeson neniam edziniĝi por flegi 133 infanojn, kiuj perdis siajn gepatrojn. Estas 15 neordinaraj familioj en la vilaĝo. Ĉiu infano rigardas la flegistino-patrinon en sia familio kiel la familietron.

La vilaĝo kovras 5 hektarojn kun kvieta medio. Enirinte la vilaĝon, oni povas vidi loĝdomojn inter vicoj da ileksoj, gazonoj, rozoj kaj deodaroj.

F-ino Sun Jiamin (Sun Ĝjamin), estrino de la vilaĝo, konigis al mi, ke en Ĉinio troviĝas SOS-vilaĝo ne nur en Yantai, sed ankaŭ en Tianjin (Tjanĝin), Qiqihar, Nanchang kaj Taiwan (Tajŭan) nelonge la prezidanto de la Centra Oficejo de Internacia SOS-organizo vizitis la vilaĝon. Li diris, ke la

Infanoj en SOS-vilaĝo ricevintaj donacon



vilaĝo donas bonan ekzemplon al aliaj SOS-vilaĝoj de Ĉinio.

Antaŭ 8 jaroj plejparto de la flegistinoj en la vilaĝo estis knabinoj en la aĝo de iom pli ol 20 jaroj. Nun ĉiu el ili flegas 7 infanojn kaj tutkore zorgas pri ilia ĉiutaga vivo.

F-ino Liu Jianru (Liŭ Ĝjanĵu), mezastatura kaj malkaŝema, en miopaj okulvitroj, venis de Baoding, Hebei-provinco. Antaŭ 5 jaroj ŝi forlasis sian hejmon kaj venis kun pretigita griza bluzo al la vilaĝo por servi kiel flegistino. Ŝi aĉetis ludilojn, kraĵonojn kaj tranĉiletojn por infanoj.

La provizado en la vilaĝo sufiĉas nur por vivi mezgradan vivon. F-ino Liu faris por ĉiu infano 2 lan-trikaĵojn. Somere ŝi refaras 7 kompletojn da lan-trikaĵoj kaj preparas por ĉiu infano 2 vatitajn pantalonojn, por ke la infanoj povu pasigi vintron.

Ŝi zorgeme preparas nutraĵon por la infanoj. Iom post iom la elektemaj infanoj alkiutimiĝis al manĝado de celerio, karoto kaj tomato. Iuj infanoj suferis de rakitismo kaj hepatito B kaj resaniĝis sub ŝia zorgado post kelkaj monatoj.

La patrinoj de la vilaĝo scias ne nur pri dietistiko, sed ankaŭ pri kulinara arto. Ili preparas por la infanoj tagmanĝon kun 4 bongustaj pladoj. La manĝaĵo el faruno de maizo kaj sojfabo estas bongusta kaj nutroriĉa.

Ĉiujare la vilaĝo invitas fakulojn instrui infanan psikologion kaj pedagogion al la patrinoj. Fakte, la patrinoj de la vilaĝo posedas kvaliton pli bonan ol tiu de ordinaraj ĉinaj patrinoj. Ili zorgas pri la infanoj en ĉiutaga vivo kaj ankaŭ donas al ili bonan ekzemplon de moralo.

Iutage f-ino Men Changsong ekmiris, ke la mono en la hejmo perdiĝis plurfoje, kaj oni ne scias kial. Ankaŭ la instruisto informis al ŝi, ke ŝia infano ŝtelis objektojn de aliaj. Ŝi pacience konvinkis lin, ke ŝteli estas malbona konduto kaj oni devas esti honesta ekde sia infanaĝo. Demandite pri la kaŭzo de la hejma ŝtelo, la knabo diris, ke aliaj infanoj povas aĉeti ludilojn, sed li ne havas monon por tio. “Mi aĉetu kion vi bezonas. Vi ne ŝtelu plu!”. Ĉe tio li elprenis el sub la seĝo 50 juanojn kaj donis la

(Daturigo sur p. 33)



Promenejo en Seulo

CHOE TAESOK* kaj WANG HANPING:

Jubilea urbo, jubilea kongreso

— Pri la okazontaj 79-a UK kaj 50-a IJK



La emblemo de la 79-a UK

LA laŭjaraj Universala Kongreso de Esperanto (UK) kaj Internacia Junulara Kongreso (IJK) en 1994 okazos respektive en Seulo kaj Chonan de Koreio. Signifoplene estas, ke ĉi-jare Seulo, en kiu okazos la 79-a UK, festas la 600-jaran jubileon de sia ĉefurbiĝo, kaj IJK estos duonjarcenta.

La korea E-movado havas longan historion. Komence de tiu ĉi jarcento, koreaj studentoj en Ĉinio kaj Japanio ekkonis kaj lernis Esperanton kaj poste disvastigis ĝin en sia lando. En 1920, post la unua publika lingvokurso gvidata de Verda E. Kim, fondiĝis en Koreio la unua E-organizo "Korea Esperantista Asocio". De tiam la movado foje viglegis, foje silentis aparte pro eksteraj kialoj. Ekde la 60-aj jaroj denove pilotis la movadon Seulo anstataŭ Taegu. En 1975 fondiĝis la Korea Esperanto-Asocio (CPO Kesto 4258, Seulo, 100-642), kaj en la sekva jaro naskiĝis dumonata revuo pri Koreio kaj pri Esperanto, *La Espero el Koreio* (CPO Kesto 5154, Seulo, 100-651). Kaj tiam la korea E-movado ekiris sur la vojon de stabila progreso. En 1993 koreaj esperantistoj okazigis la 25-an Korean Kongreson de Esperanto en Seulo.

UK okazis dufoje en Azio inter la pasintaj 78 kongresoj. La 79-a UK okazonta de la 23-a ĝis la 30-a de julio ĉi-jare estos la tria. La 600-jara jubileo de la ĉefurbiĝo de Seulo sendube aldonos al la kongreso festan atmosferon.

Seulo situas apud la rivero Han, meze de la Korea Duoninsulo, kaj troviĝas en baseno ĉirkaŭita de malaltaj montoj. En la periodo de la tri regnoj (57 a.K. — 668 p.K.), Seulo estis ĉe ilia landlimo. Tie en 1068 konstruis someran palacon la reĝo de la dinastio Koryo (918-1392). En 1394 Choson (1392-1910), la lasta dinastio de Koreio, prenis ĝin kiel sian ĉefurbon.

Nun Seulo estas la ĉefurbo de Koreio kun 12 milionoj da loĝantoj. Ĝi estas tute moderna metropolo kun harmonia unuiĝo de delikataj palacoj kaj gigantaj ĉielskrapantoj. La kongresejo de la 79-a UK estos aranĝita en la kvin-stela hotelo Sheraton Walker Hill, kie okazos la solena malfermo, internacia vespero, solena fermo kaj aliaj aranĝoj. La hotelo situas preskaŭ ĉe la orienta urbolimo, tuj apud la rivero Han. Ĝi estas iom for de la urbocentro, tamen havas freŝan aeron kaj pitoreskan pejzaĝon kaj estas facile atingebla. Ĝi ofertas tre variajn loĝeblecojn, kun franca, ĉina kaj korea restoracioj, tial ĝi estas ankaŭ paradizo por gastromoj. Ĉiuvespere estas diversaj distraj programoj.

La ĉeftemo de la 79-a UK estas "Azio en la mondo". Kiel pasintaj kongresoj, la ĉi-jara kongreso havos riĉajn programojn, inkluzive de ekskursoj. En la histori-riĉaj lando kaj regiono ĉirkaŭ Seulo ne facilos elekti inter pluraj logaj ekskursoj, kiuj kondukos al pitoreskaj temploj kaj antikvaj palacoj, admirindaj naturvidaĵoj, modernaj

mirakloj. Ili ankaŭ donos okazon gustumi butikumadon en moderna vendocentro kun etoso de iama tradicia bazaro.

Same kiel UK, ankaŭ estos la tria en Azio la 50-a IJK okazonta en Chonan de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto.

Chonan situas proksime kaj sude de Seulo. Ĝi estas fama diverĝejo kaj konverĝejo de Koreio. Proksime de la kongresurbo troviĝas multaj vizitindaj lokoj kaj naciaj parkoj. Junaj esperantistoj el diversaj mondpartoj kolektiĝos en la universitatejo Dankook en la urbo kaj festos la duonjarcentan jubileon de IJK.

La kongresa temo estas "Kia popolo, tia kulturo" — Kiaj kulturoj enmonde ekzistas? Ĉu tradicia kulturo kunligendas al la moderna? Kiaj kulturoj nuntempe avangardas? Kies manoj konstruos novan junularan kulturon? Kompreneble, fone de tiuj seriozaj kongreslaboroj ne mankos amuzaj programejoj. LKK preparas surprize interesajn koreajn popolludojn.

Nun la lokaj komitatoj de la du kongresoj estas okupataj de la lastaj preparlaboroj. La koreaj esperantistoj elkore atendas gesamideanojn, ke ili partoprenu en la 79-a UK kaj la 50-a IJK por ekkoni "landon de kvieta mateno" kaj akune konstrui fortikan domon de amikeco kaj paco de tiu ĉi mondo.

*Ĝenerala sekretario de la Korea E-Asocio kaj redaktoro de la revuo *La Espero el Koreio*.

Ĵelezo, magneto de la ĉina E-movado

MATENE de la 6-a de oktobro 1993 mi kaj s-ino Tan Xiuzhu (Tan Ŝiŭĝu), vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, helpis porti Ĵelezon en ambulanco kaj lia edzino s-ino Yin Guoxiu (Jin Gŭoŝiŭ) eskortis lin al hospitalo por urĝa savo. Mi kaj s-ino Tan venis al li por interkonsiliĝi pri E-movado, sed subite li grave malsaniĝis kaj spiradis malfacile — li estis trafita de komplikaĵo de pulmito. Poste mi iris al la hospitalo kaj vidis, ke li havas bonan konscion kaj bonetan fizionomion. Li murmuris mallaŭte ion, kion mi ne povis klare aŭdi, ŝajne la vorto estis “Esperanto”. Li penis diri ion plu, sed jam ne povis paroli. Li tusadis larmante. Ĉe la fino de 1993 mi, s-ino Tan kaj kelkaj aliaj esperantistoj vizitis lin kaj vidis, ke li jam tute ne povas paroli pro traĥea aperturigo. Li ploris, ekvidinte nin, kaj ni tre malĝojiĝis. Li pasigis kvar monatojn en la hospitalo en turmentado. Post diagnozo oni konstatis, ke li suferas de kancero kaj estas jam nekuracebla. Pli kaj pli serioziĝis lia malsano, kaj la kuracistoj jam nenion povis fari kontraŭ tio kaj klopodis nur por laŭeble longigi lian vivon per medikamentoj. Posttagmeze de la 2-a de februaro 1994 ĉesis bati lia koro. Mi venis en lian hejmon por konsoli liajn edzinon kaj infanojn. La konata salono, konataj ŝrankoj plenaj de libroj kaj gazetoj, sed forestis lia konata figuro,

neaŭdeblis lia firma basa voĉo...


Mi konatiĝis kun Ĵelezo antaŭ duonjarcento kaj neniam vidis, ke li tiel dolore ploris. Lia nomo “Ĵelezo” signifas feron. Li nomis sin fero, kaj fakte li estis fero solida, obstina, nerompebla kaj nefleksebla. Li estis plena de fido kaj espero por Esperanto. “Ni forĝistoj, feliĉan ŝlosilon forĝas ni...”, populara kanto en la 30-aj jaroj, ja prikantas tian “feron” kaj forĝiston. Sed nia Ĵelezo ne estis ordinara fero, li estis magneto, altiranta la ĉirkaŭajn homojn al la granda batalo por la rajto de homa ekzisto.

En la komenco de la tridekaj jaroj fama socia aktivulo Hujucz (1896-1986) kaj li skribis novan paĝon por la ĉina E-movado, paĝon ligantan Esperanton kun la progresaj kaj demokratiaj movadoj. Kiam li estis redaktanta la revuon “La Mondo” (1932-1935), ŝatatan de esperantistoj kaj neesperantistoj, li unuafoje publikigis la sloganon “Per Esperanto por la Liberigo de Ĉinio” kaj altiris al si sennombrajn esperantistojn, kiuj faris kontribuojn por la naci-sava movado. Kiam li estis redaktanta la revuon “Yuwen” (lingvo parola kaj skriba) (1936-1937), li altiris al si lingvistojn, reformistojn kaj praktikistojn kun diversaj tendencoj, kiuj batalis por la sana disvolvigo de opono kontraŭ la lingva hegemonio kaj protektado de naciaj lingvoj. Kiam li estis redaktanta “Ĉinio Hurlas”, “PEK-bulteno” (PEK — Proleta Esperanta Korespondado) kaj

“Heroldo de Ĉinio” (1934-1941), li same altiris kiel magneto la atenton, simpation kaj moralan kaj materialan helpon de diverslandaj esperantistoj al la granda kontraŭfaŝisma batalo de nia nacio.

Post la fondiĝo de la popola Ĉinio en 1949 Ĵelezo absorbite okupiĝis pri reformado de ideogramoj, nome normaligo kaj modernigo de la ĉina skriblingvo. Lingvo estas la plej obstina kutima forto en la homa socio, kaj ĝia reformado estas malfacilega. Sub la helpo de Wu Yuzhang (U Ĵuĝang) (1878-1966), Hu Qiaomu (Hu Ĉjaŭmu) (1912-1992) kaj Hujucz, li refoje ludis la rolon de “magneto”, sukcese altiris milojn kaj milojn da lingvaj laborantoj al la granda afero de la reformado de la ĉina skriblingvo. Multaj homoj miris, ke ili povis, en mallonga daŭro, tiom multe sukcese en la lingva reformado de Ĉinio kaj tiom forte influi la altigon de la scienca kaj kultura nivelo de la tuta nacio. Sed malmultaj povis rimarki la forton de la “magneto”.

La forto de la “magneto” fontis el la amo de Ĵelezo al la lingvoj, precipe al Esperanto. La latiniga skribsistemo de norda dialekto (poste evoluinta en la movadon de nova skriblingvo) en la 30-aj jaroj estis unuafoje prezentita en la revuo “Lingvoscienco” (aldonaĵo por la Esperanta revuo “La Mondo”) redaktata de Ĵelezo, kio fariĝis antaŭiranto de la reformado de skriblingvo de la nova Ĉinio. Kaj la fonto ankaŭ estas Es-



Ĵelezo (meze) kaj la aŭtoro (dekstre) dum la 60-a Japana Kongreso de Esperanto en 1973

peranto. Li amis Esperanton. Li senrezerve dediĉis sin al Esperanto. Ĉu la nobla idealo de Esperanto altiris lin, aŭ li, magneto, altiris aliajn sub la verdan flagon? Eble oni povas diri, ke estas du eblecoj. Lia magneta altira forto fontis el lia afableco kaj sincereco. Li neniam strangolis opoziciajn vidpunktojn. Kiam li opiniis sin prava, li pacience rezonadis kaj atendis. Oni volonte verŝis al li la koron, ĉar li jam la unua verŝis sian koron. Li respektis kaj rigore petis (mi preferus la vorton "peti" ol "postuli") la pliaĝajn kaj esperplene kaj entuziasme protektis, edifis kaj atentigis la junajn. Antaŭ 60 jaroj, kiam mi estis mezlernejano altirita de "La Mondo" sub la verdan flagon, mi skribis al ĝia redakto kun demandoj. Ĵelezo respondis al mi. Jam pasis pli ol duonjarcento, sed mi klare memoras la signifajn vortojn en la letero. Li diris, ke li lernis Esperanton ne sole por Esperanto, li lernis kaj aplikis ĝin kun kredo por la ekzisto de la homoj kaj disvastigis ĝin por la homa digno. Kiel bone, kiel trafis li diris! La vortoj difinis la direkton por la navigado dum mia tuta vivo. Mi ne estis la sola, kiu estis

altirita de la "magneto". Tio estas nevidebla kaj nepalpebla altira forto de magneto! Tiun forton perceptis ne nur ni ĉinoj, sed ankaŭ fremdlandaj samideanoj. Dum la batalo de nia nacio kontraŭ la faŝisma agreso Verda Majo plurfoje diris al mi sian percepton, kaj ankaŭ s-ro Miyamoto Masao, kiu forpasis antaŭ kelkaj jaroj, diris al mi la samon.

Pri kio zorgis Ĵelezo en siaj lastaj tagoj? Ankoraŭ pri Esperanto. En la lastaj monatoj de sia vivo li suferis de grava malsano, sed li, sidante en rulseĝo, ordigis siajn longe konservatajn Esperantajn librojn kaj donacis ilin al la Ĉina Esperanto-Ligo. En la lasta somero, kiam mi revenis de eksterlando, antaŭ ĉio li transdonis per siaj tremantaj manoj pakojn da materialoj pri Esperanto. Inter ili estis kopio de kompleta kolekto de "La Mondo", kiun alsendis fremdlanda esperantisto. En alia paketo estis ankaŭ kopio. Li diris, ke li ne povis konstati, kiu eldonis tiujn Esperantajn periodaĵojn. Sed mi ekkriis de ĝojo, ĉar ili estis korespondaĵoj skribitaj de mi, mia edzino Yu Di kaj junulo nomata Liu Bangyan en 1938 por la Kantona Centro de Internacia

Paca Kampanjo. Neniu numero mankis. Tiutage ĉeestis ankaŭ Yu Di. Ŝi tre emociiĝis. Ĵelezo laŭte ridis por dividi kun ni la ĝojon. Tian ĝojon povis percepti nur homoj okupiĝantaj pri Esperanto. Sed nelonge poste forpasis Yu Di. Malfeliĉe s-ro Liu Bangyan mortis en milito kaj ne povis dividi kun Ĵelezo la ĝojon. Antaŭ sia forpaso Ĵelezo zorgis ankaŭ pri alia afero, nome verki antaŭparolon por la ĉina traduko de "Historio de la Mondlingvo" verkita de E. Drezen kaj ĉinigita de veterana esperantisto Ŝumo, kiu aktivis en la 30-aj jaroj. Ĵelezo promesis plenumi tion en duonjaro. Sed bedaŭrinde la tempo jam ne permesis al li fari sian lastan kontribuon por Esperanto.

Foriris Ĵelezo, ŝajne malaperis la magneto. Sed restos la altira forto de la magneto, kiu estigos pli multajn magnetojn. Inter la esperantistoj de la juna generacio certe aperos nova magneto, certe. Tion mi kredas. Mi pensas, ke ankaŭ Ĵelezo tion kredis. ■

*La aŭtoro estas prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj estinta prezidanto de la Ĉina Ŝtata Komisiono pri Lingvaj Aferoj.

Funebra saluto al Ĵelezo

ĴELEZO forpasis!

Li estis unu el miaj plej malnovaj amikoj en Esperantujo, la amikeco inter ni daŭris pli ol sesdek jarojn.

Mi ekkonis lin je la komenco de 1932 dank' al la perado de Lou Shiyi, kiu estas verkisto kaj samtempe esperantisto, li konatiĝis kun Ĵelezo kiam ili ambaŭ restis en Japanio kaj aktivis en Esperanto-movado.

Ĵelezo studis en Japanio por kelkaj jaroj kaj revenis hejmlanden post la eksplodo de la milito en la nord-orienta parto de Ĉinio farita de japanaj invadantoj en septembro 1931. Kaj nelonge post lia reveno, la japanaj invadantoj refoje atakis Ĉinion kaj ekiĝis ŝanhaja milito je la fino de januaro 1932. Pro la milito, li estis devigita resti en sia hejmurbo Suzhou. Nur post la malstreĉiĝo de situacio, li venis al Ŝanhajo kaj kunlaboris kun ŝanhajaj aktivuloj por Esperanto.

“Ĵelezo” ne estis lia propra nomo, li originale nomiĝis Bao Shuyuan, “Ĵelezo” estis nur lia plum-

nomo por siaj Esperantaj artikoloj. Li prenis tiun nomon el la rus-lingva vorto ĴELEZ, kiu signifas “feron”, verŝajne por esprimi sian feran volon. Poste, laŭ la prononco li transformis tiun nomon en ĉinajn ideogramojn Ye Laishi kaj uzis ĝin kiel plumnon por siaj ĉinlingvaj verkaĵoj. Per tiu nomo li famiĝis en Esperanta kaj kultura rondoj. Oni konis lin kiel Ye Laishi aŭ Esperante Ĵelezo kaj ne plu Bao Shuyuan.

Li devenis de sufiĉe riĉa familio, kiu povis finance subteni lian vivon. Li do ne bezonis labori por ĉiutaga pano. Tamen li plenforte laboris por Esperanto

tute senpage aŭ eĉ mon-ofere.

La kanonado de la japana agreso vekis ĉinajn popolamasojn. Kun granda indigno ili konsciĝis, ke ili alfrontis eventualan katastrofon de nacia perdo, kaj ilia ununura elirejo estis firme kontraŭbatali la invadantojn spite ajnajn oferojn. Kompreneble, la ĉinaj esperantistoj ne povis esti escepto, ili aliĝis al la vicoj de patriotaj amasoj kaj marŝis antaŭen por savi sian patrolandon. Ĝuste en tia korekscita situacio, je la fino de 1931, rezulte de la iniciato de Hujucz (pioniro de ĉina Esperantomovado) kaj Lou Shiyi, oni fondis en Ŝanhajo novan Esperantoorganizon Ĉina Proleta Esperantista Unio. Ĵelezo estis unu el la fondintoj.

ĈPEU estis maldekstra organizo neakceptebla por la tiama registaro, ĝi ne povis publike funkcii kaj ĝia influo estis ege limigita. Do oni devis organizi Esperanto-movadon, kiu estu ideologie progresema kaj funkcie tute publika sub tiama kon-

Ĵelezo (sidanta dekstre) kaj la aŭtoro (staranta maldekstre) en la 30-aj jaroj



diĉo. Kiel paŝoj de starto tiu-direkte, Ĵelezo proponis okazigi Esperanto-ekspozicion por altiri intereson de la publiko al Esperanto kaj samtempe eldoni monatan revuon kiel nian propran organon. La planita ekspozicio okazis en decembro 1932 en iu granda hotelo en la urbocentro de Ŝanhajo kaj akiris neatenditan sukceson. La revuo titolita "La Mondo" ekaperis samtempe por esti senpage disdonita al la ekspozicio-vizitantoj. Pro sia riĉa enhavo kaj alloga aspekto, "La Mondo" pli kaj pli populariĝis inter esperantistoj kaj fariĝis la brila standardo de ĉina progresema Esperanto-movado. Kiel organizo de tiu movado, estis fondita Ŝanhaja Esperantista Ligo en la sekvanta jaro. Nominale, ŜEL ŝajnis esti iu loka grupo, sed fakte, per la inspira devizo "Per Esperanto por la liberigo de Ĉinio" ĝi gajnis favoran subtenon de la esperantista publiko kaj ludis la rolon de Esperanto-centro de la tuta lando en la vera senco de la vorto.

"La Mondo" kaj ŜEL ekzistis nur por kvin jaroj, ili malaperis pro estiĝo de la rezistmilito. Ilia historio estis nelonga, sed iliaj atingoj signifoplenaj.

Oni povas sentroige diri, ke tiu periodo ja estis la ora epoko de ĉina Esperanto-movado. Sendube, por tiu epoko, Ĵelezo faris elstarajn kontribuojn, lia merito estis nekalkulebla.

Tiutempe, mi kunlaboris en akordo kun Ĵelezo ĉu por redakti "La Mondo"-n ĉu por funkciigi la ŝanhajan ligan. Mi fariĝis lia sincera kamarado kaj kara amiko, ni estis "tiel intimaj kiel fratoj". Por mi persone, tiu periodo ankaŭ estis tre memorinda tempo de mia tuta vivo.

Ekde la jaro 1933, Ĵelezo multe interesiĝis pri la latinigo de ĉina ideogramo kaj okupiĝis en la latiniga movado. Li aperis

en "La Mondo" rubrikon "Lingvo-Scienco" por tiu interesa temo. "Lingvo-Scienco" trovis multnombrajn legantojn inter la intelektuloj, kaj eĉ Lusin, granda verkisto, estis en la vicoj, ĉar li mem firme pledis por la reformo de ĉina skriba lingvo. Pro tio, li finance subtenis la eldonadon de "La Mondo".

Dum la periodo de rezistmilito, Ĵelezo ankoraŭfoje utiligis Esperanton en praktiko, li engaĝiĝis en eldonado de duonmonata Esperanta revuo nomata Heroldo de Ĉinio kiel internacia informilo pri nia heroa anti-agresiva milito. Heroldo de Ĉinio estis eldonita de iu registara instanco estrata de Guo Moruo (tre eminenta granda erudiciulo). Guo kaj la aliaj estraranoj de tiu instanco donis altan takson al la sukcesa laboro de Ĵelezo kaj liaj esperantistaj kolegoj. Ekzemple, unu el la estraranoj, Yang Hansheng, kiu ankaŭ estis kultura eminentulo, en sia rememora artikolo detale priskribis tiun revuon. Li laŭdis, ke ĝi plaĉis al siaj diverslandaj legantoj kaj havis "tre bonan kaj vastan influojn" en multaj landoj.

Post la fondiĝo de la popola respubliko, Ĵelezo, estante prestiĝa specialisto, posteniĝis kiel vicestro de la ministerio-ranga ŝtata instanco Komisiono de Lingva Reformo. La reformado de ĉina skriba lingvo estas tre malfacila kaj komplika afero, kio, do, ŝargis Ĵelezon per tre peza laboro. Tamen, lia fervoro kaj sindonemo al nia lingvo neniom malpliĝis. En julio 1956, li kune kun Chen Yuan kaj mi vojaĝis al Kopenhago por ĉeesti la 41-an Universalan Kongreson. Reprezentante ĉinan esperantistaron, li faris salutparoladon en la inaŭguro de la Kongreso. Nia ĉeesto estis historie signifa, ĉar ja estis la unua fojo, ke Ĉinio sendis sian delegacion al UK, kaj ankaŭ unuafoje ĉinaj

esperantistoj aperis en la Kongreso de post la fondiĝo de nia nova respubliko. Poste, Ĵelezo plurfoje partoprenis internaciajn Esperantajn kunvenojn kiel estro de ĉina delegacio. Estas menciinde ke, kvankam li estis tre okupita, li neniam forgesis zorgi pri la afero de ĈEL kaj EPC, kaj de tempo al tempo donis siajn konsilojn por plibonigi nian laboron.

Estas tre bedaŭrinde, ke dum la lastaj jaroj de lia vivo, lin trafis cerba trombozo. Li parte paralizigis kaj nur povis moviĝi tre malfacile. Sekve de tio, li estis devigita resti hejme kaj malofte eliri el sia domo, tamen, en okazoj de Esperantaj aktivadoj, li nepre partoprenis helpe de aliuoj. Lia intereso al la pekina UK estis tiel granda, ke li ne nur ĉeestis la inaŭguron sur la podio, sed ankaŭ restis longe en kongresejaj ĉambroj por interparoli kun la kongresanoj. Ĝuste dum tiu kongreso UEA deklaris, ke Ĵelezo estis elektita kiel honora membro de tiu aŭtoritata internacia organizo. Tiun honoron li ja plene meritis.

Fine, en la lasta oktobro, kiam li vizitis hospitalon, la kuracisto trovis, ke en lian pulmon entrudiĝis kanceraj ĉeloj kaj estis senespere lin resanigi. Tiam mi ne estis en Pekino, kaj nur povis lin viziti en hospitalo pasinta-januare, li jam perdis la parolpovon, sed ankoraŭ povis etendi sian manon kaj firme manpremis kun mi. Sed ho ve! Post ĉirkaŭ du semajnoj, li jam silente kuŝis sur la lito en funebra halo. Mi jam ne plu povis interparoli aŭ manpremi kun li. Kion mi povis fari, estis nur stari respekte kaj saluti lin por la lasta fojo kun larmoj aen la okuloj! Mi perdis por ĉiam mian karan amikon ĴELEZO! ■

* Vicprezidanto de ĈEL kaj honora membro de UEA.

ESP-NOVAĴOJ

Lastatempe multaj esperantistoj kaj E-organizoj sendis al ni Esperantajn artikolojn, novaĵojn kaj fotojn. Koran dankon! Ni esperas, ke diverslokaj Esperantaj organizoj kaj individuoj daŭre kunlaboros kun ni. Bonvolu sendi vian kontribuadon al s-ro Wang Hanping, El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, Pekino, 100037, Ĉinio.

La Red.

● En la 79-a UK okazos la Esperantologia Konferenco, kies temo estas "Esperanto el Azia Rigardo". Tiuj, kiuj deziras partopreni en la konferenco kiel preleganto aŭ kiel simpoziano, estas petataj kontakti la preparan grupon ĉe: Korea Esperanto-Asocio, aŭ Ho Song, Chamsil Chugong apt. 345-303, Chamsil 3-dong Songp'a-gu, Seoul 138-223, Koreio.

● Aprile de 1994, la Ĉina Filatela E-Asocio kaj la Ĉina Medicina E-Asocio fondiĝis en Pekino kaj Zaozhuang de Shandong-provinco respektive.

● Por akceli la aplikon de Esperanto en la turisma servo, la Xi'an-a Internacia Turisma Kompanio "PACTUR" en la provinco Shaanxi (Ŝenŝji) starigis Esperanto-Sekcion, kiu esperas, ke ĉinaj kaj alilandaj Esperantaj organizoj kaj individuoj kunlaboros kun ĝi, kaj bonvenigas esperantistojn al Xi'an.

E Decembre de 1993 la E-Asocio de Interna Mongolio kunsidis memore al la 100-a datreveno de la naskiĝo de Mao Zedong, simpatianto de Esperanto.

Brazilaj esperantistoj festas la 134-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof en la restoracio "Granda Murego".



Multaj el la ĉeestantoj estis studentoj de universitato de Interna Mongolio. En la lastaj 2-3 jaroj pli ol 400 studentoj de la universitato lernis nian lingvon. La Universitato de Interna Mongolio kaj la Normala Universitato de Interna



Inaŭguro de Esperanto-Placo en Barcelono

Mongolio fondis E-asocion.

● Sub la aŭspicio de Taguatinga Esperanto-Klubo, 34 esperantistoj de la ĉefurbo kunvenis je la 17-a de dec. 1993, en tre agrabla restoracio Granda Murego de Taguatinga (satelita urbo de Brazilio), por vespermanĝo memore al la

134-a naskiĝdato de L.L. Zamenhof. La foto montras, ke la junulo Andre Luiz Alexandre (en tute blankaj vestoj) deklamas poemon al sia instruisto Carlos Maria, kiu staras antaŭ li. Inter ili sidas okulvitre s-ro Francisco

Mattos de Oliveira, prezidanto de Brazilia Esperanto-Ligo.

● Organizite de la Hispana Esperanta Fervoĵista Asocio, la 18-an de dec. 1993, 80 barcelonaj esperantistoj okazigis kunvenon en Premia de Mar por festi la 134-an datrevenon de la naskiĝo de L.L. Zamenhof. Okaze de la festo estis inaŭgurita la Esperanto-Placo.

● Por la tria fojo, en nov. 1993 Esperanto-Klubo de Venado Tuerto okazigis publikan ekspozicion sub la titolo "Ĉinio kaj Esperanto". La ekspozicio, kiu

funkciis dum tri tagoj, montris precipe bildojn de tiu lando kun ties homoj, kutimoj, pejzaĝoj, socia vivo, industrio, komerco ktp.

En la ekspozicio okazigita de la Esperanto-Klubo de Venado Tuerto



ANTAŬ 60 jaroj iu usona advokato mortis en frenezulejo de Ĉikago. Li havis neniun mone-ron ĉe sia morto, tamen post-lasis valoran testamenton.

Li skribis en la testamento:

Mi havas malmulte da scioj pri leĝo, kaj tiun malgrandan havaĵon mi ne povas donaci al la homaro. Kaj la plej kara por mi estas mia vivo, kaj ankaŭ tiun unusolan vivon mi ne povas donaci al la homaro. Escepte de tiuj du, mi volas donaci al la homaro ĉion mian karan.

Antaŭ ĉio, mi donacas al la infanhavaj gepatroj diversajn vortojn, laŭdantaj kaj amzorgantaj la infanojn. La gepatroj devas dece kaj indulgeme uzi tiujn vortojn laŭ bezono de la infanoj.

POR KOMENCANTOJ

Valoraj heredaĵoj

Al infanoj mi donacas la freŝajn florojn en la mondo, disvolviĝantajn ĉu sur la ebenaĵoj, ĉu en la arbaroj. Ili gaje ludu, laŭ sia plaĉo, inter la floroj. Mi donacas al ili ankaŭ ŝtonetojn trembrilantajn ĉe la riveroj aŭ sur la riverfundoj, la aromajn salikajn branĉojn spegulitajn inverse sur la akvosurfaco kaj la blankajn nubojn super la arbaroj.

Al iom grandaj infanoj mi donacas ĉiujn terenojn de la ebenaĵoj, parkoj kaj placoj por via pilkoludo, de la belaj riveroj, lagoj kaj golfoj por ilia naĝo kaj de la neĝlokoj por ilia amuziĝo.

Mi donacas al geamantoj...

Mi donacas al gejunuloj...

Mi donacas al gemaljunuloj...

Li volis donaci al ĉiuj homoj diversajn belajn heredaĵojn, sed li forpasis antaŭ ol fini la testamenton.

Li mortis kiel frenezulo en la malsanulejo. Ĉu la vortoj en la testamento vere estis skribitaj de frenezulo? La testamento publikigis en ĵurnalo kaj ricevis altan takson de la legantoj.

Oni rimarkis, ke la advokato menciis nenion aĉeteblan per mono, sed testamentis tion kaj alion tre gravajn por la vivo. ■

Preskaŭ entute la materialo estis elprenita de la revuo "El Popola Ĉinio". La intereso de la ĝenerala publiko estis granda, kaj tio montrigis pere de kvanto da vizitantoj kaj iliaj demandoj pri Ĉinio kaj Esperanto.

● La 67-a Kongreso de la Senacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazos en Strážnice de la Ĉeĥa Respubliko inter 16-23 de julio, 1994. Ĝia antaŭkongreso kun riĉa turisma kaj kultura programo okazos en Prago, la ĉefurbo de Ĉeĥio, inter la 9-a kaj la 16-a de julio. Ankaŭ faka programriĉa kolokvo organizita de Akademio de Esperanto okazos inter la 7-14-a de julio. La adreso de la sekretario de OKK: Vlada Hasala, PK. 36, CZ-69662 Strážnice, Ĉeĥio.

● En la programo de la 37-a Internacia Seminario de la Germana Esperanto-Junularo okazinta inter 12.27/1993-1.3/1994 en Neumünster, estis unuafoje dulingva prelego pri saniĝado per spiritaĵoj fortoj laŭ la instruo de

Bruno Gröning. Parolis kuracisto Matthias Kamp, tradukis Detlef Meier el la germana en Esperanton.

● Esperanto-Societo en Turku aranĝos siajn agadojn somere de 1994 kiel jene: E-kursoj de la 6-a ĝis la 10-a de junio gvidotaj de Andrzej Pettyn kaj Nordia Forumo en Turku kun prelego, ekspozicioj kaj bazaro, de la 1-a ĝis la 6-a de aŭgusto.

● Okaze de la 27-a Somera Studsemajno en Jyväskylä, Finnlando, inter la 4-a kaj 8-a de julio 1994 funkcios kvar kursoj: kurso por komencantoj, preparkurso por la elementa ekzameno, preparkurso por la meza ekzameno kaj kurso por Esprimarta Studrondo. Post la studsemajno UEA/ILEI-ekzamenoj okazos la 8-an ĝis 10-an samloke.

● En Karlskoga Popola Altlernejo estos Eŭropo-kurso, en kiu studos dek gejunuloj pri Eŭropo en tri lingvoj — la sveda, la angla

kaj Esperanto. Posttagmeze aŭ vespere multaj studentoj el la aliaj fakoj de la lernejo studos Esperanton. Kaj pluraj kursoj funkcios ĉe la Esperanto-fako de Karlskoga Popola Altlernejo: ok-semajna komencanta kurso 22/8-14/10; ok-semajna progresiga kurso 24/10-20/12; somera kurso kvar-nivela 13-18 de junio 1994. Ili invitas lingvajn instruistojn sen scio pri Esperanto al speciala kurso.

● Skolta Esperanto-Ligo festis sian 75-jariĝon en 1993. Okaze de tio SEL eldonis jubilean numeron de "La Skolta Mondo", kiu enhavas interesajn informojn pri ĝiaj historio kaj nuntempa agado.

● En 1994, Kultura Centro Esperantista en Svislando ofertas varian programon. Dum la tuta jaro, diversgradaj lingvokursoj, kulturaj, sciencaj kaj turismaj aranĝoj kiel ankaŭ UEA/ILEI-ekzamenoj atendas la e-istaron.



Gajaj fratetoj

En infanĝardeno

Fotoj de LIU SIGONG

Infanoj estas moviĝemaj. Tio estas ilia naturo. Kaj moviĝo utilas al ilia kreskado korpa kaj mensa. Por ke la infanoj plene disvolviĝu, la infanĝardeno de la Ĉina Konstrua kaj Transporta Instituto anstataŭigis la antaŭajn ordinarajn aktivejojn similajn al tiuj de elementa lernejo per aktivejoj taŭgaj por ilia aĝo, ekz., tiuj de sci-lernado, scienca eksperimento, muziko, pentrado, ĉarpentado kaj ŝakludo. Tiel la infanoj povas kaj amuziĝi kaj ricevi edukon.

Grimaco



"Ĉu vi scias?"





Imita hospitalo

Eksterdoma ludo



Amuzejo de infanoj



ŜTALA URBO KAJ RIZA BAZARO

de JI PING

EN 206 a.K., t.e. la 4-a jaro post kiam forpasis la Unua Imperiestro de Qin-dinastio (221 a.K. — 206 a.K.), Liu Bang, imperiestro de la Okcidenta Handinastio (206 a.K. — 25 p.K.), kiu pereigis Qin-dinastion kaj Xiang Yu, gvidanto de kamparanaj insurrekciuloj, batalis por la regpotenco. Malvenkinte, la lasta forkuris al Wujiang-urbeto proksime al Yangzi-rivero kaj sin mortigis en la loko. Laŭdire, la ĉevalo de Xiang Yu triste henadis kaj fine mortis, longe ne vidinte sian mastron, post kiam boatisto veturigis ĝin trans la riveron. La boatisto enterigis ĝian selon, kiu poste transformiĝis en monton, pro tio la loko nomiĝas Ma'anshan. Ma'anshan ĉinlingve signifas Selo-monton.

Sur la ĉina mapo antaŭ 38 jaroj ankoraŭ ne troviĝis la urbo Ma'anshan. Tiam sidis en la loko nur Jinjia-vilaĝo kun ĉ. cent familioj, kiuj sin okupis je fer-ŝtala industrio nur kun kelkaj malgrandaj altfornoj. Oktobre de 1956 oni fondis la urbon Ma'anshan, kiu poste famiĝis tra la tuta lando pro sia produktado de ŝtalo.

FLUGANTAJ ĈEVALOJ

La urbo Ma'anshan situas en la orienta parto de Anhui-provinco. Sub ĝi estas 4 distriktoj kaj unu gubernio kun la totala areo de 1 694 kvadrataj kilometroj kaj 1.06 milionoj da loĝantoj. La urbo najbaras norde al Nankino kaj sude al Wuhu, alia urbo ĉe Yangzi-rivero.

Ĉe vojkruciĝo al la urba centro, mi vidis gigantan statuon de tri flu-


gantaj ĉevaloj. La ŝoforo diris al mi, ke ili estas simbolo de tiu nove disvolviĝanta industria urbo.

La urbo kaj ĝiaj najbaraj lokoj estas abundaj je minaĵoj. La certiginta kvanto de ferferco estas ĉ. 3.1 miliardoj da tunoj, tiu de sulfurerco 220 milionoj da tunoj kaj fosfonierco 15 milionoj da tunoj, kiuj okupas la unuan lokon de tiuj de Anhui-provinco. Kaj krome, la urbo, troviĝanta ĉe Yangzi-rivero, havas oportunan trafikon kaj akvan kaj teran, tio multe favoras al disvolviĝo de la fer-ŝtala industrio. Septembre de 1958, prezidanto Mao Zedong diris, vizitante la urbon: "Pro siaj favoraj kondiĉoj, la urbo disvolviĝos en mezgrandan ŝtalan kombinaton." Hodiaŭ lia deziro realiĝis. Kiel unu el la dek grandaj fer-ŝtalaj entreprenoj de Ĉinio, la Fer-ŝtala Kompanio Ma'anshan produktas jare 2.4 milionojn da tunoj da ŝtalo kaj 2.3 milionojn da tunoj da fero. Kaj la kompanio posedas produktolinion

de drato kun laminata rapideco de 120 m/sekundo. En merkato de Hongkong oni mendas komercaĵojn laŭ la prezo de produktoj de la kompanio Ma'anshan, la prezo de ĉiuj samspecaj produktaĵoj ne devas superi tiun de Ma'anshan. Kiel ĉefa produktobazo de fervojaj reloj, la kompanio funkciigas ankaŭ fabrikon de vagonaj radoj, la plej grandan de Azio. Nun 3.6 milionoj da vagonaj radoj rulantaj sur fervojoj de Ĉinio estis produktitaj de la kompanio.

Ĉe iu baldaŭ finkonstruota altforno kun volumeno de 2 500 kubmetroj, mi babilis kun ĉefdirektoro Li Zongmi. Li diris al mi, ke ekde 1993 tiu ĉi entrepreno aplikis la akcian sistemon kaj ĝia nomo ŝanĝiĝis en Ma'anshan-an Limigitan Akcian Kompanion, kiu emisiis akcion A unue enlande kaj poste en Hongkong, kie oni povas aĉeti per usona aŭ Hongkong-a dolaro. Dank' al la praktiko de akcia sistemo, la kompanio ŝanĝis sian administran siste-

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE YANGZI-RIVERO




mon, partoprenis internacian konkurencon kaj iris en internacian merkaton. En 2000 la kompanio produktos jare ses milionojn da tunoj da ŝtalo.

WUHU, FENESTRO DE PORDOMALFERMO

La urbo Wuhu, granda haveno de Yangzi-rivero, distancas de ĝia enfluejo ĉe Ŝanhajo je 400 km. Ĝi ĉiam havas intimajn rilatojn kun Ŝanhajo kaj la regionoj de la delto de Yangzi-rivero. Situante inter Ŝanhajo en malsupra baseno de Yangzi-rivero kaj Wuhan en la meza, ĝi havas grandan geografian avantaĝon.

Estante unu el la dek grandaj havenurboj ĉe Yangzi-rivero, Wuhu havas oportunan trafikon. Tie larĝas la rivero kun rekta bordo, kiu longas je 48.6 km. kaj eĉ en seka sezono la akvo profundas je 9 m., pro tio 10 000-tonelaj kargoŝipoj povas ankriĝi tie en la tuta jaro. Yuxikou ĉe norda bordo de la rivero, unu el la tri grandaj karbohavenoj de la tuta lando, estas la plej frua rivera karbohaveno de Ĉinio. La jara en- kaj elŝipiga kvanto de la nove konstruita Eksterakomerca Kajo Zhujiaqiao estas 1.52 milionoj da tunoj. En 1980 la ŝtato sankciis Wuhu-havenon kiel eksterakomercan havenon, tial oni malfermis regulajn navigvojn de vara transporto de Wuhu al Hongkong kaj Japanio kaj la neregulajn rekte al Singapuro, Malajzio kaj aliaj landoj. En Wuhu kunligiĝis kvar fervojoj, kiuj kondukas al diversaj lokoj de la lando. Kaj krome, pli ol 10 ŝoseoj kunligas la urbon kun Huangshan-monto, Jiuhua-monto kaj aliaj turismaj vidindejoj.

Wuhu estas grava bazo de malpeza industrio de Anhui-provinco. La tiea tekstila industrio konsistas el kotonteksado, prestinkurado, trikado, lanŝpinado, linteksado kaj silkteksado, kiuj formis kompletan sistemon. En la lastaj jaroj rapide disvolviĝas en la urbo la industrioj de mekanismo, elektroniko, metalurgio, ŝipfarado, kemio, konstruaj materialoj, medikamen-



Rizo de Wuhu eksportota alilanden

toj kaj manĝaj-prilaborado. Tie formiĝis iom post iom sinteza industria sistemo kun la malpeza kiel la ĉefa parto.

Anhui-provinco prenis Wuhu kiel gravan lokon por praktiki la politikon de pordomalfermo kaj Wuhu turnis grandan atenton al la perfektigo de sia ekonomia tekniko-ekspuata kvartalo.

“Pere de avangardaj spertoj de ĉemaraj regionoj la Wuhu-a ekonomia tekniko-ekspuata kvartalo kreis tute novan sistemon, ke oni faras administradon laŭ internaciaj kutimoj,” diris al mi s-ro Zhang Ping, estro de la urbo. “La ekspuata kvartalo estas malfermita ne nur al Ĉinio, sed ankaŭ al aliaj landoj. En niaj okuloj ĉiuj investaĵoj venintaj de aliaj lokoj estas bonvenigataj, kaj la investantoj ĝuas favoran politikon de Wuhu. Ni deziras, ke la tuta provinco ĝuu nian favoran politikon kaj nia ekspuata kvartalo fariĝu fenestro kaj bazo de pordo-

malfermo de la tuta provinco.”

La ekspuata kvartalo distancas de la urbocentro je 6 km. Ĝi troviĝas tuj ĉe Yangzi-rivero, kuniĝas kun la Eksterakomerca Kajo Zhujiaqiao kaj internacia kontenerokajo, tuj apud la pontetendaĵo de la konstruota pontego super Yangzi-rivero. Ĝi najbaras je 2 km al la Wuhu-a Aerodromo, nova fervoja stacidomo kaj je 50 km. al la Nankina Internacia Aerodromo, kiun oni planas konstrui.

Laŭ projekto la ekspuata kvartalo ampleksos 42.5 kvadratajn km en la estonteco kaj baldaŭ ĝi kovros 10 kvadratajn km. En la ekspuata kvartalo ne nur prosperas industrio, sed ankaŭ floras sciencoj, teknikoj, komerco, turismo, servado k.a. De 1990 ĝis la fino de 1993 aroj da normaj industriaj fabriksdomoj kaj specialaj laborejoj finkonstruiĝis sur areo de 0.5 kvadrata km laŭ kontrakto. Oni importis arojn da programoj elektronika, telekomuni-



La urbo Ma'anshan

Foto de **CHEN HONGTAO**

ka, mekanika, aŭta, subtilekemia k.a., kun la totala investo de ĉ. 2.4 miliardoj da juanoj. Ĝis la fino de la kuranta jarcento, la totala ekonomia produktovaloro de la tekniko-ekspluata kvartalo atingos aŭ superos tiun de la tuta urbo nuntempe, per tio oni povos konstrui alian novan urbon.

RIZA BAZARO

Wuhu havas historion de pli ol

2 000 jaroj. Post la 10-a jc. ĝi fariĝis foiro de diversaj varoj kaj en la fino de la 19-a jc. en Wuhu formiĝis giganta riza bazaro, tiel prospera kiel la 3 aliaj ĉinaj grandaj rizaj bazaroj en Changsha, Jiujiang kaj Wuxi. Poste la bazaro depresiis por ia tempo. Sed hodiaŭ, dank' al la agrikultura disvolviĝo de Anhui-provinco, denove prosperas la riza bazaro de Wuhu kaj ĝiaj grenaj kaj oleaj produktado, prilaborado kaj

vendado. Ĝi starigis komercajn rilatojn ne nur kun 28 provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio, sed ankaŭ kun aliaj landoj kaj regionoj. En Wuhu funkcias grenejoj, kiuj povas teni 100 milionojn da kg. da greno. En la urbo funkcias du fervojoj specialaj por transporti grenon. Nun oni konstruas ankaŭ kajon por 3 000-5 000-tonelaj ŝipoj transportantaj grenon. Nun la jara riz-prilabora povo estas 150 milionoj da kg. ■


En la fabriko de vagonaj radoj


Foto de **XU XIANG**



Aŭtomata produktolinio de la fer-ŝtala kompanio

Foto de **LI MINGZHENG**





La krudmateriala kajo de la Fer-ŝtala Kompanio Ma'anshan

Foto de LI MINGZHENG





Tu-aj junulinoj kun bela kapornamo

LI QIANG:

KAPORNAMOJ DE TU-AJ VIRINOJ

LA tu-aj virinoj, kiuj loĝas en la nordorienta parto de la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo, donas grandan atenton al beligo de siaj vestoj. Ili portas belkolorajn vestojn kun brodaĵoj. Estas aparte menciindaj la 9 specoj da kapornamoj de la tu-aj virinoj, okulplaĉaj kaj originalaj. La tu-oj nomas kapornamon niŭda-o. Ĉi-sube mi konigu al vi iam furorintajn kapornamojn de tu-aj virinoj.

A. La kapornamo tuhun-o. En formo de disko ĝi estas inkrustita per buntaj perloj, bukĉenoj kaj konkoj, kun multe da tufoj da ruĝaj kvastoj pendantaj antaŭ la frunto. Kiel plej antikva kaj altklasa kapornamo, ĝi simbolas la socian pozicion de tu-aj aristokrataj virinoj. Ĝin portas virinoj de nur kelkaj grandaj vilaĝoj. Laŭ loka moro, se knabinoj de la vilaĝoj edziniĝos al junuloj de aliaj lokoj, kiel kutime, ili daŭre portos tuhun-on. Kaj la knabinoj de aliaj lokoj, edziniĝintaj al junuloj de la vilaĝoj, devas ŝanĝi sian kapornamon per tuhun-o.

Por porti tuhun-on antaŭ ĉio oni devas plekti siajn longajn harojn en altan hartuberon post

la metencefalo. Poste, oni devas fiksi du oblongajn kuprajn lametetojn fadene interligitajn sur la tempioj kaj meti bovostan novlunan fiksilon sur la metencefalon. Post kiam oni metas la kapornamon sur la hartuberon, oni devas kovri ĝin per arĝenta bovloforma ornamo kaj alpingli la bovloforman ornamon, niŭda-on kaj hartuberon per arĝentaj harstangetoj, kun du tufoj da ruĝaj koton-ŝnuroj pendantaj sur la malantaŭa parto de la kapornamo. Fine oni devas porti ankaŭ grandajn arĝentajn orelingojn kaj kolĉenon el rondaj lamenoj de bukĉeno.

B. La kapornamo ŝige-o. En formo de ventumkorbo ĝi aspektas kiel la antaŭo de selo. Ĝi estas multe pli populara ol tuhun-o.

Por fari la kapornamon oni devas unue prepari skeleton el elastaj pajloj kun malmolaj paperecoj kaj tolstrioj gluitaj sur ĝi. Estas gluitaj sur ĝi ankaŭ oraj kaj arĝentaj stanfolioj kaj falditaj buntaj tolstrioj. La malmola rando de la ornamo estas inkrustita per ringformaj lamejoj brilantaj, kun ruĝaj kvastetoj, pendantaj sub ili. Dekoj da 10-centimetraj ruĝaj kvastetoj, pendantaj ĉe la frunto kaj tem-

pioj, kovras la kapon.

C. La kapornamo najen-o. Ĝi plej okulfrapas per kupra tridentata spado, metita sur la ĉapkovrilo kun ruĝaj kvastoj. La malantaŭo de la kapornamo estas komplika strukture: Ĝi havas diskon kun diametro de pli ol 10 centimetroj faritan el interligitaj konkoj, koraloj k.a. La disko surhavas ankaŭ kuprajn tubetojn, porcelanajn bidojn, kvastetojn kaj metalajn lamejojn. Ju pli multe da ili, des pli bela la kapornamo.

Ankaŭ iuj aliaj kapornamoj portas ruĝajn kvastojn malsamlongajn. La malsameco kuŝas nur en formo kaj populareco. Necesas multa tempo por surmeti tian kapornamon, kaj kun ĝi estas malfacile sin movi. Ĝenerale, la tieaj virinoj ne portas tiajn kapornamojn. Ili plektas siajn harojn en du longajn harligojn, ornamitajn per ruĝaj kvastoj kaj kun interligitaj pintoj. Poste ili surmetas rondan brokatan ĉapon sur la kapon, kun la harligoj pendantaj sur la dorso.

Nun la aŭtentikaj kapornamoj de la tu-a nacio jam servas kiel naturaĵoj por studi la evoluon de la nacio. ■

Situ Zhaoguang kaj liaj skulptaĵoj

de XIAO YI

PROKSIME de la strato Chang'an de Pekino, en malgranda promenejo staras blank-marmora statuo de knabino en jupeto, kun haroj kombitaj malantaŭen kaj manoj apogitaj sur la vangoj. La knabino legas libron sur la genuoj per siaj migdalaĵoj. Ŝi legas absorbite, kvazaŭ ŝi sidus ne ĉe la movoplena strato, sed ĉe kvieta loko for de la urbocentro. Ĉiuj promenantoj senescepte haltas antaŭ la skulptaĵo por apreci ŝian allogan mienon.

La skulptaĵon "Legado" kreis fama skulptisto prof. Situ Zhaoguang, kiu instruas en la skulptura fakultato de la Centra Belarta Instituto de Ĉinio.

S-ro Situ Zhaoguang




Kun "Legado" kiel ekzemplo, en skulptado prof. Situ preferis lirikismon, emfazante la temperamenton kaj internan rilaton kaj movadon de la skulptito. Krom memorigaj skulptaĵoj, prof. Situ plejofte prenas virinon, infanon, patrinon kaj filon kiel temojn por skulptado kaj dronigas ilin en profundan vivetoson kaj intensan lirikismon. Kiel li diris, li donas apartan atenton al humaneco.

En lia kabineto plena de aromo de cipreso estas la ligna skulptaĵo "Ventumi sekalgrajnojn", kreaĵo farita de li post dujara vivado en Tibeto. Ĝi figuras tibetan virinon, kiu, altastatura kaj fortika, tenas en la manoj ventumkorbon plenan de sekalgrajnoj. Kun leviĝo de la brakoj

la sekalgrajnoj falas kiel kaskado kaj ĝojo pro riĉa rikolto videblas ĉe ŝiaj buŝanguloj. Je mencio pri la premiita skulptaĵo "Knabino", prof. Situ emociiĝis, dirante: "Ĝi estis tenajle fiksita sur mia tablo tri jarojn. Dum longa tempo mi ne prilaboris ĝin, sed mi ofte rigardis ĝin." Finfine prof. Situ decidis ĝin prilabori. Li atenteme poluris la vizaĝon de la knabino, sed konservis pliparton de la kruda ŝelo de la ligno, tiel ke la delikata haŭto de la knabino draste kontrastas kun la ŝelo kaj la knabino distingiĝas per honesteco kaj modesteco.

"Aglido" enkorpiĝas la eternan amon inter patrino kaj filo. Prof. Situ kaptis la apartan amon de tibeta virino al sia infano kaj havigis al la skulptaĵo distingiĝan guston per arta prilaboro. La patrino figuro, simila al aglo, montras la senkomparan bravecon kaj profundan patrinan amon de la tibeta nacio sur la altebenaĵo. La patrino kun profunda amo rigardas la bebon en sia sino, la estontan "aglon".

La verkoj "Manĝigi Cervon", "Amiko en Malproksimo", "Sur la Dorso" kaj "Patrino kaj Filo" ĉiuj prezentas la strebon al humaneco de prof. Situ kaj enkorpiĝas lian nereteneblan patoson. Dum skulptado de memoraĵoj prof. Situ emfazas ankaŭ la internan mondon de la skulptitoj. Zhu De (Ĝu De) estis ĉina gvidanto deveninta el kamparana familio. La skulptaĵo "Zhu De" bone en-



“Patrino kaj Filo” (Ligna skulptaĵo)


corpigas la karakteron de tiu ĉi kamparana filo kiel ĉefgeneralulo kaj soldato. La afabla rideto de Zhu De spegulas lian amon al siaj soldatoj kaj la intimecon inter li kaj ordinaraj popoloj. Dum trijara preparado por la skulptaĵo “Guo Moruo” (ĉina fama historiisto, arkeologo, poeto kaj dramisto) prof. Situ studis multajn materialojn pri li. Iutage venis al li en la kapon la sceno, ke sub prospera ginko s-ro Guo Moruo jen piedas jen sidas en meditado. Tiel estiĝis la skulptaĵo: s-ro Guo sidas sur verda gazono en la korto, kun fingroj interkrucitaj antaŭ la genuo. La skulptaĵo vivece figuras tiun ĉi kulturan eminent-

tulon de Ĉinio.

Dekojn da jaroj antaŭe, prof. Situ Zhaoguang lernis en la skulptura fakultato de la Centra Belarta Instituto de Ĉinio, poste li studis en la Repina Belarta Instituto de Sovetunio. En la pasintaj 20 jaroj li okupiĝis pri instruado kaj skulptado. Li opinias, ke skulptado ne signifas kopiadon, sed verŝadon de patoso. Li opinias ankaŭ, ke nepre necesas mem fari skulptaĵon por atingi plej bonan artan efikon. Li ĉiam faras skulptaĵojn de ligno, ŝtono kaj bronzo per si mem kaj liaj skulptaĵoj estas ŝvite faritaj verkoj kaj por eterne tenas sian valoron de arto. ■



“Ventumi Sekalgrajnojn” (Ligna skulptaĵo)



"Legado" (Marmora skulptaĵo)

Promenado en la Monda Parko de Pekino



Afrika vidindaĵo

EN la sudokcidenta antaŭurbo de Pekino estis dezerta loko, kie sterniĝis sablokampo kaj furiozis flava polvo en vento. Kampanoj komencis planti tie arbojn en 1986 kaj ĉ. 1 000 familioj ekokupis sin pri florkulturado. En 1992 tie jam regis verdaj kaj aromis floroj. En 1993 ĉe la kampanoj naskiĝis deziro imite fari famajn vidindaĵojn de la mondo, por ke oni havu la feliĉon ĝui ilin en Pekino. Ili sukcese konstruis la Mondan Parkon, en kiu kolektiĝis 106 miniaturaj vidindaĵoj de 40 landoj. Ĝi fariĝis bela turisma loko de Pekino kaj altiris al si multajn ĉinajn kaj alilandajn turistojn.

Ĉe la enirejo de la parko, sur altaj muroj vidiĝas granda reliefa fresko sur marmora fono — Pordo de la Mondo. Tie vidiĝas la civilizita homa historio kaj moroj de dekoj da nacioj. Ĝi funkcias kiel gvidilo de la parko kaj tre helpas al la vizitado.

En la parko la vidindaĵoj plejparte estas en proporcio 1:10 aŭ 1:30. Ili diferencas de la liliputaj objektoj. Oni povas eniri en la vidindaĵon, kvazaŭ ili persone vizitus la verajn konstruojn. Tuj ĉe la enirejo interne de la parko majestas la itala Tabela Ĝardeno konstruita laŭ la proporcio 1:1. Tiu terasforma konstruo aspektas vere grandioze, rigardate de proksime kaj de malalte. Antaŭ la ĝardeno ŝprucas fontano, ĉarmas florbedoj, sur la terasoj tavolo post tavolo vidiĝas skulptitaj balustradoj kaj graciaj dekoj da skulptitaj homfiguroj el blanka marmoro. En la parko staras ankaŭ Katsura Rikyu — provizora rezidejo de japana mikado — la Troja Ĉevalo de Turkio, maoria kabano de Nov-Zelando kaj Varsovia Marvirino, kiuj montras la originalan belecon de tiuj mondfamaj konstruaĵoj kaj elegantaj artaĵoj.

La egiptaj piramidoj, hinda Maŭzoleo Taj Mahal kaj itala Koloseo tre allogas turistojn. La egiptaj piramidoj, rigardate kiel mirakloj de la homa arkitekturo, estas mondfamaj historiaj objektoj. La plej granda el ili troviĝas en Gizo. Ĝi konstruiĝis en 2700 a.K., ĉ. 140 m alta el 230 ŝtonoj 2.5-tunaj. En la parko la imitaĵo alta je 10 m. estas konstruita el pli ol 200 000 marmoraj brikoj sapograndaj. Apud ĝi staras alia piramido, Sfinkso, la Templo Abu Simbel kaj aliaj egiptaj vidindaĵoj. Promenante sur la sablotero ĉirkaŭ ili, oni kvazaŭ eniras en grandan dezerton.

Sude de la egiptaj piramidoj vidiĝas aro da paj-

laj domoj, skulptitaj homfiguroj k.a., kiuj montras la naciajn morojn de afrikaj indiĝenoj. La maldelicate skulptita totemo admirigas la turistojn, kiuj neniam estis en afrikaj ĝangaloj.

Estas mirakloj la ŝtonaj statuoj sur Pasko-insulo en la senlima Pacifiko. La pli ol 600 ŝtonaj statuoj sur la insuleto restas enigmo hodiaŭ. Ili faris la insulon mondfama. En la parko vidiĝas insuleto ĉirkaŭita de akvo. Sur la insuleto vidiĝas dekelkaj ŝtonaj statuoj kun rekta nazo, profundaj okulkavoj, mallarĝa frunto kaj grandaj oreloj. Ili ĉiuj rigardas la grandan maron kun alte tenata kapo kaj antaŭenigitaj lipoj. Ili formis mirindan pejzaĝon de Pasko-insulo.

Inter la amerikaj vidindaĵoj troviĝas la Tajin-a Konstruo de Colamns. Proksime de ĝi estas usonaj vidindaĵoj: Blanka Domo, Kapitolo de Vaŝingtono, Memorhalo de Lincoln, Monumento de Vaŝingtono, Spaca Centro John F. Kennedy kaj insulo Manhattan de Novjorko. Tie arbore staras domoj, elspirantaj urban moderecon. Elirinte el la urbego, oni eniras en alian mondon, la Grandan Kanjonon. Tie majestas 109 artefaritaj montpintoj. La plej alta el ili altas 32 metrojn. Kaskado 16 metrojn alta tondre plaŭdas ĉe la valofundo.

Eŭropaj vidindaĵoj troviĝas en la centra parto de la parko. Tie vidiĝas ne nur la altega Ejfel-turo de Parizo, la klinita Turo de Pizo, Nia Damo de Parizo, Domo de Nacia Dieto de Londono kaj antikva kastelo de Germanio, sed ankaŭ statuo de la Unua Civitano de Bruselo, nederlanda Ventmue-lilo kaj rusa Kremlo.

La grandiozaj kaj majestaj konstruaĵaroj de Azio plene montras la arkitekturajn trajtojn de la Oriento. La japana Kvinetaĝa Turo, la tajlanda Granda Palaco, la Birma Ora Pagodo kaj la Granda Muro de Ĉinio estas tre allogaj por la turistoj. Por kiel eble plej multe malgrandigi la diferencon inter la miniaturaj kaj la realaj vidindaĵoj, oni faris la imitaĵojn el materialoj identaj kun la originalaj. La skulptado, muldado, orumado kaj aliaj metiartoj tre beligis tiujn orientajn konstruojn. Por la Ora Pagodo oni uzis pli ol 2 000 g da oro. Nun la pagodo ore brilas en sunlumo kaj antaŭ ĝi oni sentas sin kvazaŭ en budhisma sanktejo.

Oni diris, ke estas aranĝo de pliaj vidindaĵoj en la parko. ■



Turistoj portas antikvan kostumon por foto.


SUR STRATOJ


Ĉirkaŭ la Imperiestra Palaco

Fotoj de LIU SIGONG

La Imperiestra Palaco, kie regis kaj vivis imperiestroj de Ming- kaj Qing-dinastioj de la komenco de la 15-a jc. ĝis la komenco de la 20-a jc., estas simbolo de suvereneco. Hodiaŭ, sekve de la reformado praktikata en Pekino, la komercaĵa ekonomio senprecedence disvolviĝis. Ĉie ĉirkaŭ la Imperiestra Palaco vidiĝas vendobudoj, etmanĝejoj, legombazaroj, butikoj de modaj vestoj ktp. Tio aldonis novan aspekton al tiu antikva Imperiestra Palaco.


Etmanĝejo






Matena foiro

Stando de kandizitaj fruktoj



En legombazaro



Barbiroj ĉe muro de la Imperiestra Palaco



Kampanoj-laboruloj en urboj

de XIAO NAN

MULTAJ el la ĉinaj kampanoj, kiuj sin vivtenis per terkulturado dum jarmiloj, nun lukras en prosperaj ĉemaraj urboj de Ĉinio. Tie ili servas kiel krom-laboristo, etkomercisto, purigisto kaj vartistino. La nombro de tiaj kampanoj jam atingis 60 milionojn.

Por kio ili, forlasinte sian hejmlokon, iras malfacilan vojon? Kion alportos la granda migrado de kampanoj? En kiu direkto ĝi disvolviĝos? Ĉio ĉi estas multe zorgata de diversaj rondoj de la ĉina socio.

La ĉefan parton de la migrantoj konsistigas superflujaj laboruloj de la ĉina kamparo. Ĉinio havas 450 milionojn da kampanoj-laboruloj kaj 93 400 000 hektarojn da kampoj. Laŭ la nuna produktiveco maksimume 200 milionoj da laboruloj sufiĉas por kulturi ilin kaj 110 milionoj por la vilaĝaj entreprenoj de Ĉinio. Alivorte, en la ĉina kamparo ankoraŭ estas 140 milionoj da superflujaj laboruloj. Videble, ke la granda disvolviĝo de la ĉina ekonomio neprigos la solvon de la problemo laŭ la leĝo de merkato.

Fine de la 70-aj jaroj ekpraktikiĝis respondeca sistemo de laŭkontrakta produktado en la ĉina kamparo kaj la jara pokapa enspezo de kampanoj pliiĝis je 13.6% kaj la kondiĉoj de loĝado, vestado kaj manĝado pli-malpli boniĝis. Tamen, estis granda diferenco de enspezo inter kampanoj kaj

urbanoj. Por turniĝi el malriĉeco kampanoj devis serĉi laboron en urboj. Tio estas alia kaŭzo de la granda migrado.

90% de la kampanoj-laboruloj, kiuj nun laboras en urboj, estas junuloj. Ili laboras kun pli alta celo. Antaŭe ili okupiĝis ĉefe pri konstruado kaj nun okupiĝas ankaŭ pri transportado kaj komercado. Iuj laboras eĉ en la alt-teknika kampo.

Kompreneble, la granda migrado premias la politikon de reformado kaj pordomalfermo. Ne plu ekzistas la izoliteco inter la kamparo kaj urboj kaj la urboj estas malfermitaj al kampanoj; la disvolviĝo de urba konstruado kaj leviĝo de ekspluatataj regionoj ege grandigas la eblon doni laboron al kampanoj; kaj la politiko de malfermado preparis vojon al kampanoj por fari la grandan migradon.

La granda migrado de kampanoj neeviteble streĉigas la trafikon, multe ŝarĝigas la urbojn kaj malordigas la socion. Precipe antaŭ la Printempa Festo, tradicia festo de Ĉinio, sennombraj kampanoj-laboruloj hastas hejmen por renkontiĝi kun siaj familianoj kaj post la festo ili denove elhejmiĝas kaj sin direktas al la urbaj laborlokoj, kio faras la stacidomojn kaj kajojn terure homplenaj. Kaj foje eĉ okazis akcidento. Krom la supre diritaj, estas ankaŭ aliaj problemoj pri loĝado, administrado, naskolimigo kaj publika sekureco.

Sendube, granda nombro da

kampanoj-laboruloj estas grava forto por konstruado de urboj, precipe de la ĉemaraj urboj. Ili prosperigas la terciaran industrion per sia laboro. Fakte, la rapida ekonomia disvolviĝo en Shenzhen, Zhuhai, Pudong, Delto de Perlorivero k.a. estas nedisigebla de la enmigrado de laboruloj, precipe de kampanoj-laboruloj.

Kompreneble, kampanoj-laboruloj faras grandan kontribuon al la konstruado de sia hejmloko per sia enspezo. Laŭ statistiko, en la unua duonjaro de 1993 la kampanoj de Sichuan-provinco kun plej granda loĝantaro en Ĉinio, kiuj laboras en aliaj lokoj de la lando, sendis 2.58 miliardojn da juanoj al sia hejmloko. Praktike ili larĝigis sian vidkampon, intensigis la konscion de merkato, pordomalfermo kaj konkurenco kaj pligrandigis la kapablon de administrado. La ekonomiaj informoj senditaj de ili multe influas sur la koncepto, vivmaniero kaj produkta administrado de la lokaj kampanoj. Tio akcelas la ekonomian disvolviĝon de la kamparo. Tiusence, la granda migrado de superflujaj kampanoj-laboruloj estas progreso.

En multaj urboj de Ĉinio kampanoj-laboruloj estas postenigitaj de administraj instancoj, entreprenoj, kompanioj kaj loĝkvartalaj komitatoj. Iuj el ili okupiĝas pri terciara industrio kaj tenas intiman rilaton kun lokanoj. Multaj kampanoj-laboruloj fikso loĝas en urboj. Tie ili geedziĝas, naskas kaj laboras. Ili partoprenas



Senlaboraj kamparanoj-laboruloj



Kamparanoj-laboruloj torentas en urbon.

en la tiea socia aktivado.

Konsiderante la fakton, ke la ĉina ekonomio disvolviĝas malek-vilibre kaj superflua laboruloj de la kamparo ekzistos en sufiĉe longa periodo, oni opinias, ke tiu migrado fariĝos pli granda estonte. Do ne estos facile solvi la sociajn problemojn kaŭzitajn de tio. Lastatempe la Labora kaj Personara Ministerio de Ĉinio ellaboris "Planon por akordigi la laboradon en la kamparo kaj urboj" por faci-

ligi la solvadojn.

La plano konsistas el jenaj eroj. 1. Elmigrado devas esti farata kun proceduroj, nome, necesaj formoj kaj laŭleĝaj proceduroj estas bezonataj por laborigi kamparanojn aliloke. 2. Enmigrado devas esti farata kun reguloj, nome, necesaj programoj kaj sistemo estas bezonataj por postenigi kamparanoj-laborulojn venintajn de aliloke. 3. Perfektigi la servadon al la migrantaj kamparanoj-laboruloj dum

la tuta procedo. 4. Necesaj rimedoj por kontrolado, nome, intensigi la administradon kaj kontroladon kaj havi kontrolan sistemon en la ĉefaj regionaj labormerkatoj de Ĉinio. 5. Bonefikaj rimedoj por racie konduki la migradon de kamparanoj-laboruloj en la pintoj antaŭ kaj post la Printempa Festo ĉiujare.

La plano validos por tri jaroj de oktobro de 1993. Oni esperas, ke la migrado de kamparanoj-laboruloj estos en bona ordo. ■

(Daŭrigo de p. 10)

monon al sia patrino. Post tio neniam okazis ŝtelo en la hejmo.

Post kiam la infanoj ekvizitis lernejon, la patrinaj plej zorgis pri ilia lernado.

Fino Zhang Yuxiao (Ĝang Juŝjaŭ) flegis 2 infanojn ne tiel saĝajn. Kiam ili lernis en la unua klaso, unu el ili gajnis nulon en la ekzameno de matematiko kaj la alia gajnis 6.5 poentojn, por ne paroli pri skribado. Kiel klerigi ilin estis granda malfacilo por la instruisto. Tiam ŝi komencis instrui la infanojn pri matematiko kaj skribado per skemo kaj nigra tabulo sur la muro. Ŝi ofte donis instruadon ĉe manĝpreparado. Ŝi instruis la infanojn pri kalkulado per pomo, kaj arakido k.a. Dank' al ŝia helpo ambaŭ infanoj rapide progresis en lernado.

La infanoj de la vilaĝo venis el malsamaj provincoj kaj regionoj, kiel Shandong, Henan, Heilongjiang kaj Xinjiang (Ŝingĵang). Je la komenco ili ne povis kompreni unu alian pro lingvobaro. La patrinoj do lernigis ilin pri la komuna parollingvo de Ĉinio, tiel ke ili feliĉe vivis en la granda familio.

La patrinoj donas al la infanoj amon sinceran, senegoisman kaj respektindan, dum la lastaj reciproke oferas al ili amon honestan, puran kaj profundan.

Yu Xiping publikigis la artikolon "Mi kaj mia patrino Xiulan" en la revuo "Ĉina Virino", n-ro 6, 1992. Ĝi legiĝas:

"Patrino estas rigora al ni en ideologio, moralo kaj konduto. Kaj ŝi afable donas al ni sian tutan koron. Ni profunde sentas, ke ni havas la plej grandan patrinan amon en la mondo.

Mi vivis kune kun mia patrino 3 jarojn. Mi ĉiam sopiras al ŝi. Mi ofte skribas al ŝi kaj deziras, ke mia patrino bonfartu kaj miaj plijunaj gefratoj multe zorgu pri ŝi.

Mi amas la vilaĝon, mi amas mian grandan familion kaj mi pli amas mian patrinon Xiulan. Por ĉiam mi estos membro de la familio kaj filo de patrino Xiulan.

Mi ne estas orfo, ĉar mi havas familion kaj patrinon." ■



Avo kaj nepo



Instruado al infanoj

Familia orkestro

Fotoj de LIU SIGONG

Najbaroj venis spekti la prezentadon de la familia orkestro.





Interŝanĝo de ludartoj

En strateto de la Okcidenta Distrikto de Pekino estas neatentokapta dentkuraĉejo, de kie ofte aŭdiĝas en vespero muziko ludata per eŭropaj instrumentoj. La mastro estas 65-jara Dun Haoran. Li ŝatas ludi eŭropajn instrumentojn ekde la 50-aj jaroj. Inluante de li, liaj filoj kaj nepoj havas fortan inklinon al muzikaj instrumentoj. Preskaŭ ĉiuj liaj familianoj scipovas ludi tian aŭ alian instrumenton. Tiel naskiĝis la familia orkestro. Vespere la tuta familio kolektiĝas por ludo.



Ĉiu havas sian ŝaton.

LANDO POEZIA

de HOU JUELIANG

KIOM da antikvaj poemoj verkitaj en diversaj dinastioj de Ĉinio daŭre cirkulas hodiaŭ? Estas malfacile precize respondi tiun ĉi demandon. Laŭ la kalkulo de fakuloj, almenaŭ 300 000.

Ĉinaj poemoj havas longan historion. Antaŭ ol aperis skriblingvo, prapatroj de la ĉinoj jam buŝe verkis poemon, kantante pri sia laboro, ekz:

断竹,续竹;飞土,逐肉。

Ĝi estas kvarverso el ok ideogramoj, ĝerminta antaŭ 3 000 jaroj. Ĝi temas pri la tiama ĉasista vivo. Ĝi skizas: Oni hakas bambuon, dispecigas ĝin kaj faras el ĝi pafarkon por ĉasi birdojn kaj bestojn.

Poste pli kaj pli multigis tradiciaj poemoj. En la 500 jaroj de la 11-a jc. ĝis la 7-a jc. a.K., inter la popolanoj cirkulis entute pli ol mil poemoj. Oni kolektis kaj ordigis ilin en la libron "Shi Jing", kiu cirkulas ankaŭ hodiaŭ. Ĝi el 305 poemoj, kiel la plej antikva poemaro de Ĉinio, spegulas la socian realon antaŭ 2 500 jaroj.

Ĉiu poemo en "Shi Jing" konsistas el pluraj versoj. Ripetada kantado donas bonan lirikan efikon. Ĝenerale, ĉiu verso konsistas el kvar ideogramoj. Ekz.:

蒹葭苍苍,白露为霜。

所谓伊人,在水一方。

溯洄从之,道阻且长;

溯游从之,宛在水中央。

Tio estas la unua strofo de amsopira poemo, la enhavo de la sekvantaj du strofoj estas preskaŭ sama. Ĝi havas refrenon dum kantado. Ĝi rakontas, ke li deziregas renkontiĝi kun sia amatino aŭtune, kiam floras fragmitoj. Ja estas malfacile vidi ŝin! Versajne ŝi loĝas en la supra baseno de rivero. Se li serĉus ŝin laŭ la bordo, la vojo estas malproksima kaj malfacila; se li veturus laŭ la fluo por viziti ŝin, ŝi, kvazaŭ starante meze de la senlima akvo, estas aspirebla, sed neatingebla.

La antikvaj ĉinaj poemoj nedisigeblis de muziko. Ĉiu poemo estis adaptaĵo de muziko. Ĝi estis kaj deklamebla kaj kantebla. Ankaŭ la postaj poeziaĵoj, ĉi- kaj ĉju-o estis similaj. Bedaŭrinde, tiel multaj muziknotoj kun tempopaso perdiĝis, kaj nun restas nur poemoj.

En la evoluado de la antikvaj poemoj komence estis nur buŝaj popolaj kreaĵoj, nur poste aperis poeto. En la 3-a jc. a.K. aperis la unua granda ĉina poeto Qu Yuan (Ĉju Jūan). Li, kiel elstara talentulo, estis kortegano de Chu-regno. Kalumniite li estis ekzilita. En tiu tempo li verkis longan versaĵon "Lisaŭ", rakontante pri sia malfel-

iĉa travivaĵo. Ĉiu poemo en la poemaro "Shi Jing" konsistis el malmultaj ideogramoj, sed "Lisaŭ" el 2 400 ideogramoj. La sep-ideograma aŭ ses-ideograma verso de Qu Yuan anstataŭis la kvar-ideograman. Por esprimi sian senton la poeto metis la sensignifan vorton 兮 en la mezon de ĉiu versparo. Oni nomis la novan stilon "chu ci", per kiu Qu Yuan esprimis sian senton. Ekz.:

长太息以掩涕兮,哀民生之多艰!

愿逍遥而横奔兮,览民尤以自镇!

La poeto diris: Mi ofte veas kun larmoj kaj ĉagreniĝas pro mizero de la popolo. Kiel mi volas min liberigi el la malĝojo kaj iri al fremda loko, kaj mi forlasis la ideon, vidante la suferantajn popolanojn. Ne sukcesinte liberigi sin de la sufero, Qu Yuan dronis en rivero.

Krom "Lisaŭ", Qu Yuan verkis ankaŭ multajn lirikajn poemojn. Post lia forpaso aliaj verkis multajn poemojn imite lian stilon. Liaj kaj alies verkoj estas kolektitaj en la poemaro "Chu Ci". "Chu Ci" kaj "Shi Jing" ambaŭ estas mejloŝtonoj en la evolua historio de la ĉina poezio.

Post "Chu Ci", formoj de poezio senĉese evoluis, kaj aperis poemo el kvin-ideogramaj versoj, kun nefiksita nombro de versoj. La reprezentanto de tiustilaj poemoj estis drinkema Tao Yuanming (365-427). Li diris: "Mi ĉiam bedaŭras, ke mi ne sufiĉe drinkis dum la vivo." Li ne volis flati la superulojn, rezignis la oficon kaj revenis al la kamparo, kaj preskaŭ fariĝis "almozulo". Li per kvin-ideogramaj versoj notis sian hontindan almozpetan staton:

饥来驱我去,不知竟何之;

行行至斯里,叩门拙言辞。

La poemo koncize priskribas: Malsato pelis min al almozpeto, sed kie mi serĉu almozdonanton? Mi malrapide iras al iu domo, kaj frapas je la pordo. Sed kiam la pordo malfermiĝis, mi ne sciis kion diri. La poeto prezentis sian tristan animstaton kaj honton en la almozado.

Kun la apero de kvin-ideogramaj versoj, naskiĝis ankaŭ sep-ideogramaj versoj. La duspecaj versformoj fariĝis rimaj en Tang-dinastio (618-907) kaj havis fiksjajn metri-kajn regulojn. Ni prenu sep-ideogramajn poemojn kiel ekzemplon. Ĉiu tiuforma poemo konsistas el ok versoj, ĉiu el sep ideogramoj, kun rimo en ĉiu finaĵo de la parnombraj versoj, la vortospecoj inter la tria kaj kvara, tiuj inter la kvina kaj sesa versoj devis esti respondaj. Laŭ la prononcado de ĉinaj ideogramoj la versaĵo kun harmoniaj tonoj legiĝis belsone, agrable kaj ritme. Estas ankaŭ kvar-versaj poemoj, ĉiu el kvin aŭ sep ideogramoj. Poetoj de Tang-dinastio laŭ la stiloj verkis multe da



poemoj, pli ol 50 000 el ili ĝis nun konserviĝis. Poezio de Tang-dinastio floradis pro multaj kaŭzoj. Sed la plej grava estas alta takso far la registaro, kiu elektis ŝtatoficistojn laŭ liaj poemoj. Por akiri oficon kaj havi bonan estontecon, multaj intelektuloj diligente lernis verkadon de poemo. En Tang-dinastio naskiĝis multaj grandaj talentaj poetoj. Oni nomis Li Bai (701-762) feo de poezio kaj Du Fu (712-770) — sanktulo de poezio. Ni citu sep-ideograman versaĵon de Du Fu:

黄四娘家花满蹊, 千朵万朵压枝低。
留连戏蝶时时舞, 自在娇莺恰恰啼。

La poemo priskribas, ke la poeto rigardas florojn ĉe la najbaro, tie bonodoras maro da printempaj floroj, kiuj allogas dancantajn papiliojn kaj kantantajn oriolejn. Legante ĝin, oni kvazaŭ vidas bildon en la poemo kaj legas poeziaĵon en la bildo.

En Tang-dinastio aperis ankaŭ ci-o, novstila poemo, el versoj malsamlongaj. Ci-o ordinare dividiĝas en du strofojn, supran kaj malsupran, kun fiksjaj nombroj de ideogramoj, versoj kaj fiksjaj rimoj, kaj estis verkita laŭ la melodio. Ci-istoj antaŭ ĉio devis bone scii la melodiojn. En Song-dinastio (960-1297) ci-o plej floradis kaj perfektigis. Kiel konate, estis sume 826 melodioj. Ĉi tie ni konigu ci-on pri printempo verkitan de Huang Tingjian. Ĝi konsistas el du strofoj, kun la versoj malsamlongaj:

春归何处? 寂寞无行路。
若有人知春去处, 唤取归来同住。
春无踪迹谁知? 除非问取黄鹂。
百啭无人能解, 因风飞过蔷薇。

Ci-isto Huang Tingjian amis printempon, kiu tamen estis tro mallonga. Li veis: Kien forperdiĝis printempo? Estas solece nenie ĝui printempon. Se oni scias, kie estas printempo, oni venigu ĝin por akompani nin. Kiu scias, kie estas printempo? Escepte se vi demandu oriolon, kiu povas konigi vin pri tio per kriado, sed ĝin neniu komprenas. La oriolo trovis sin tute senhelpa kaj forflugis de rozbranco laŭ la printempa vento.

En Yuan-dinastio (1279-1368) aperis ĉju-o, nova stilo de poezio, kun popularaj vortoj kaj liberaj rimoj. Ĉju-o, poemo kaj ci-o estas forme diferencaj, tamen esence ili ĉiuj estas poeziaĵoj kun rafinitaj beloj en sento, bildo, muziko kaj ideo. Ekz. Ma Zhiyuan (ĉ. 1250-1321) verkis malgrandan nostalgian ĉju-on:

枯藤老树昏鸦, 小桥流水人家,
古道西风瘦马, 夕阳西下, 断肠人在天涯。

En kunfandiĝo de la animstato kaj medio ĝi priskribas nostalgion de vojaĝisto en speciala situacio: Okcidenta vento, subiranta suno, velkiginta liano, maljuna arbo, vespera korvo, mallarĝa ponteto, malgranda kabano kaj antikva vojo. Vojaĝisto sur malgrasa ĉevalo staras ĉe antikva vojo kaj sopiras al malproksimaj karuloj. Kie estas la karuloj? En la malproksimo. La poeto diskonigis la median solecon por montri sian internan suferon.

“Shi Jing”, “Chu Ci”, popolkantoj, poezio de Tang-dinastio, “ci-o” de Song-dinastio, “ĉju-o” de Yuan-dinastio kaj la sub ilia influo naskitaj modernaj poemoj formis maron de poeziaĵoj kaj faris Ĉinion lando poezia. ■

Arkeologiaj eltrovooj en Tibeto

TIBETO, ĉirkaŭita de neĝkovritaj montoj, estas abunda je historiaj objektoj. En la lastaj dek jaroj arkeologia grupo ĉefe el tibetanoj jam naskiĝis kaj pligrandiĝis. Arkeologo Suolang Wangdui, estro de la Tibeta Administrantaro de Historiaj Objektoj, diris:

Ekde 1984 oni faris enketon en la regionoj Shannan, Xigaze, Ali kaj Qabdo kaj trovis sume 1 668 lokojn kun historiaj objektoj, inkl. de tiuj de praestafaj fosilioj, paleolitikaj objektoj, poluritaj kaj nepoluritaj ŝtonaj instrumentoj, neolitikaj ruinoj, antikvaj surro-kaj bildoj, ŝtonkavernaj temploj, antikvaj tomboj, altaraĵoj, kastelaj kaj palacaj ruinoj, antikvaj konstruaĵoj kaj temploj.

ARKEOLOGIAJ ELTROVOJ DE LA ŜTONA EPOKO

La arkeologiaj materialoj pri la

Ŝtona Epoko de Tibeto estis plejparte trovitaj post 1951.

En Tibeto troviĝas multaj paleolitikaj ruinoj, el kiuj la plej malnova aĝas dek mil jarojn, tamen ĝis nun oni ankoraŭ ne trovis paleolitikajn ruinojn kun klaraj stratomoj. Oni trovis ilin nur sporade en la gubernioj Dingri, Xanza, Ruto kaj Busheng en sia geologia esplorado. La Tibeta Sciencist-esplorista Grupo sub la Ĉina Akademio de Sciencoj trovis 40 nepoluritajn ŝtonajn instrumentojn, inkl. de ŝtonaj platoj, skrapiloj kaj pintaj instrumentoj, kiam ĝi laboris en la gubernio Dingri 4 500 m super la marnivelo.

Junie de 1990, oni trovis du paleolitikajn ruinojn en la gubernio Jilong. En unu el ili oni trovis 92 ŝtonajn platojn kaj instrumentojn sur la tersurfaco, inter kiuj estis ĉefe skrapiloj. En la alia oni trovis sur la tersurfaco 11 gruzajn


batilojn prilaboritajn duflanke. La tie trovitaj ŝtonaj instrumentoj estas similaj al paleolitikaj objektoj en sudokcidenta Ĉinio. La eltrovo havas gravan signifon por esplori la civilizitan historion de la ĉina nacio.

La plej grava arkeologia frukto de la neolitiko en Tibeto estas malkovro de la ruino Kano, trovita en 1976. Kano estas vilaĝo 3 100 m super la marnivelo, je 20 km sude de Qabdo. Ĝi estas prifosita ruino kun plej granda altitudo en Ĉinio.

En Kano oni trovis 26 ruinojn de domoj, elterigis dekmilojn da ŝtonaj, ceramikaj kaj ostaj instrumentoj, grenon kaj birdajn kaj bestajn ostojn. Oni konfirmis, ke ili ĉiuj estis faritaj en la neolitiko de la primitiva socio antaŭ 4 600 jaroj. Ili prezentas la primitivan kulturon de orienta Tibeto. Laŭ analizo, tiam la tieaj popoloj jam fiksloĝis, okupis sin ĉefe pri terkulturado kaj ankaŭ pri ĉasado kaj brutobredado. Tiam ili multe kontaktiĝis kun la landinterno de Ĉinio. La supre diritaj eltrovooj havas gravan signifon por studi la fruperiodan historion de Tibeto kaj rilatojn inter la hana kaj tibeta nacioj.

En la 80-aj jaroj oni faris esploradon en la ruinoj Qugong kaj Dalongcha en la antaŭurbo de Lhasa, la ĉefurbo de Tibeto, kaj

Surrokaĵoj budhostatuoj sude de Lhasa faritaj en la 7-a jc



Argilaĵoj elterigitaj en la ruino Kano



akiris grandan rikolton. La ruinoj aĝas jam pli ol 4 000 jarojn kaj estas tipa modelo de la antaŭhistoria kulturo de la tibeta nacio.

ANTIKAJ TOMBOJ

Oni eltrovis multajn tombojn de Tubo-regno. Tio estas grava frukto de la arkeologia laboro en Tibeto. En tiu periodo la tieaj loĝantoj kutime entombigis la mortintojn kaj pro tio tomboj troviĝas preskaŭ ĉie en Tibeto. Nun oni jam eltrovis pli ol 200 tombejojn, inter kiuj la Tombejo de Tibetaj Reĝoj en Qonggya-gubernio kaj tiu en Lieshan, Langxian-gubernio, estas bone konataj.

La Tombejo de Tibetaj Reĝoj estas la plej granda el la antikvaj tombejoj trovitaj en Tibeto ĝis nun. Tie ripozas ĉiuj reĝoj de Tubo-regno, vivantaj en la periodo de la 7-a ĝis la 9-a jc. La diversgrandaj tomboj estas kvadrataj kun ebena tegmento. Pro longatempa natura erozio iuj el ili fariĝis rondformaj kun ebena tegmento. Ili plejparte altas dekkelkajn metrojn. La Tombo de Sunzamkampo kuŝas tuj ĉe ŝoseo. Sunzamkampo estis fama reganto de Tibeto. Zigzaga ŝtuparo kondukas de montpiedo al la templo kun statuoj de Sunzamkampo k.a. ene. En la tombo ripozas Sunzamkampo kaj liaj edzinoj princinoj Wencheng kaj Chizun. Tie entombiĝas ankaŭ granda nombro da aliaj ob-

jektoj.

La tombejo en Lieshan estas konservita pli bone ol la Tombejo de Tibetaj Reĝoj. Ĝi troviĝas sur la suda deklivo de Lieshan-monto 3 200 m super la marnivelo kaj aspektas majeste. La 184 tomboj kuŝas en la orienta kaj okcidenta partoj. Tie troviĝas ankaŭ kultejoj kaj steleoj. La totala areo ampleksas 810 000 kvadratajn metrojn. La tomboj havas formon de trapezo, kvadrato, rondo kaj II-cifero. Inter ili la tomboj en formo de trapezo estas la plej multaj.

En la lastaj dek jaroj tibetaj arkeologoj trovis 40 tombejojn kun pli ol 4 000 tomboj en Qabdo, Nyingchi, Lhasa, Shannan kaj Nagqu. En Nyingchi oni trovis ankaŭ antikvajn ŝtonajn ĉerkojn. En la vilaĝo Dubu norde de Niyang-rivero 3 150 m super la marnivelo estas pli ol 100 bone konservitaj ŝtonaj ĉerkoj de Tubo-regno, kiuj ampleksas la areon de 8 800 kvadrataj metroj. En Xigaze oni trovis dekojn da tombejoj kun miloj da tomboj. En Lhaze-gubernio estas trapeza tombo 17 m alta kaj 78 m longa. Antaŭ ĝi estas kavo por entombigi ĉevalojn. Tie staras steleo kun antikva tibetlingva skribo kaj kaŭras paro da ŝtonaj leonoj.

Post la pereado de Tubo-regno en Tibeto furoris ĉiela kaj akva sepultoj kaj tera entombigo estis farata nur en la izolaj regionoj kaj loĝlokoj de loba-oj kaj menba-oj.

ŜTONKAVERNOJ, SURROKAJ BILDOJ KAJ GIGANTAJ ROKOJ

En la lastaj jaroj oni trovis en Tibeto multajn antikvajn ŝtonkavernajn templojn kaj surrokajn gravuraĵojn. Sur krutaĵo norde de Jilong-gubernio legiĝas la hantlingva teksto "Diplomato de Tang-imperio al Hindio" farita en 658. Ĝi temas pri la trafiko inter Ĉinio, Hindio kaj Nepalo. Ĝi estas valora historia objekto por studi la rilatojn inter Tang-imperio kaj Tubo-regno kaj la trafikon inter Ĉinio kaj Hindio.


Sur montotalio 3 950 m super la marnivelo de la monto Muza, Lhaze-gubernio, oni malkovris ŝtonkavernon konstruitan en la tempo de Tubo-regno. En la kaverno sidas kvin altreliefaj budhaj statuoj, unu el kiuj portas juvelon kaj la aliaj estas nudaj. La statuoj estas unuafoje trovitaj en la tieaj ŝtonkavernoj. La arkeologoj konfirmis, ke la ŝtonkaverno estis konstruita antaŭ 1 200 jaroj.

La arkeologoj iris al malproksimaj montregionoj kaj malkovris grandan nombron da surrokaj bildoj faritaj en la periodo de la primitiva socio ĝis la tempo de Tubo-regno. Kvazaŭ longa historia rulpentraĵo, ili montras la pasintecon de la tibeta nacio. La surrokaj bildoj trovitaj en Ali kaj Xigaze estas multe atentataj de enkaj eksterlandaj arkeologoj.

En Ali oni trovis du lokojn kun surrokaj bildoj. En seka riverujo oni trovis bildojn gravuritajn sur apika krutaĵo. Sur la krutaĵo 400 m longa vidiĝas 40 bildoj de sovaĝaj bovoj, ĉamoj, cervoj, ĉevaloj kaj homoj rajdantaj, dancantaj aŭ batalantaj kun ŝildo en la mano. La plej okulfrapa estas bildo kun cento da piedirantoj kun pakajo sur la dorso.

La loko apartenis al la regno Xiangxiong en la antikveco kaj estis la naskiĝloko de la religio Benbo. Ĝi estis ankaŭ la nepra trapasejo de Tubo-regno al suda, meza kaj okcidenta Azio kaj Eŭropo. Ĝuste tra ĝi enkondukiĝis en aliajn partojn de Tibeto kulturo de Grekio, Persio kaj Hindio.

La arkeologoj eltrovis ankaŭ mirindajn vidindejojn el gigantaj rokoj, kiuj estas amasigitaj en ronda formo aŭ en geometria bildo. En 1990 oni jam malkovris kelkajn tiajn bildojn rigardatajn kiel sanktaj objektoj. La tieaj loĝantoj ofte kultas ilin. Oni komencis esplori tiun mirindan kulturon antaŭ nelonge en Tibeto. ■



Privataj lernejoj leviĝantaj

AŬGUSTE de 1992, la elementa lernejo Guangya establiĝis en Chengdu, la ĉefurbo de Sichuan-provinco. Ĝi estas la unua plej granda privata lernejo starigita post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949. Poste iuj malproksimvidaj personoj kaj entreprenistoj oferis monon por funkciigi lernejojn, kaj tiel leviĝis en Ĉinio entuziasmo por funkciigi privatajn lernejojn.

Fakte, privata lernejo ne estas fremda por la ĉinaj maljunuloj, inkluzive de ĉ. 50-jaraj mezaĝuloj, ĉar nemalmultaj el ili estis klerigitaj en vilaĝaj privataj lernejoj aŭ en mez- kaj altlernejoj establitaj de eklezianoj aŭ komercistoj. Oni povas diri, ke Ĉinio estas unu el la landoj, kiuj plej frue funkciigis privatan lernejon. Antaŭ 2 500 jaroj Konfuceo, granda ĉina edukisto kaj fondinto de konfuceanismo, iniciatis privatan lernejon. Li havis 3 000 lernantojn, 70 el kiuj poste fariĝis eminentuloj. En la 20- kaj 30-aj jaroj, dank' al la prospero de la nacia kapitalismo en Ĉinio, populariĝis privataj lernejoj. Tial, iasence, la ĉina eduka historio komenciĝis de ŝtataj lernejoj kaj prosperis pro privataj lernejoj.

En 1952 Ĉinio ŝtatigis ĉiujn privatajn lernejojn, ĉu elementajn, ĉu mezgradajn, ĉu altajn. En la postaj 40 jaroj la ŝtato respon-

decis pri ellaboro de eduka politiko kaj lernoprogramo, salajro de instruistoj kaj lernokotizo de lernantoj. Rezulte de tio, la ĉinaj geknaboj ĝuis 9-jaran devigan edukadon, dum la ŝtato portis grandan ŝarĝon. La elspezo de la ŝtato por eduko kreskis jaron post jaro, tamen ankoraŭ multe mankis monrimedoj al diversspecaj lernejoj.

La realaĵo de Ĉinio montris, ke estas necese ŝanĝi la supre diritan staton. Kun la reformado de la ekonomia sistemo, tiu eduka sistemo ne plu akordiĝis kun la dis-

volviĝo de Ĉinio, kaj nek povis plene kontentigi la bezonon de iuj socitavoloj kaj ties membroj. Sekve, naskiĝis privataj lernejoj.

De la naskiĝo de lernejo Guangya en 1992 ĝis julio de 1993, fondiĝis 700 privataj lernejoj en Ĉinio. De septembro 1993, kiam establiĝis en Pekino la unua privata elementa lernejo Jinghua (Ĝinghŭa), ĝis nun, dekkelkaj privataj lernejoj aperigis en ĵurnalo anoncon por varbi lernantojn. Krome, pli ol 90 tiuspecaj lernejoj estos starigitaj post sankcio de koncerna departemento.

Leciono en Shuren-lernejo





Lernantinoj ordigas sian liton.

En la ĉemara urbo Wenzhou (Ŭengoŭ) kun rapide disvolviganta ekonomio la lernantoj de privataj lernejoj konsistigas pli ol 10% de tiuj de la urbo. La lernejo Jinghua planis akcepti 150 lernantojn. En malpli ol unu monato la nombro de anoncintoj jam superis cent.

Kial do privataj lernejoj povas altiri al si tiel multe da lernantoj?

La ĉefa faktoro estas ilia alta eduka nivelo. Nun preskaŭ ĉiuj privataj lernejoj emfazas la edukon celon, ke la lernantoj estu kvalifikitaj en ĉiuj flankoj, nome, en moralo, intelekto kaj fiziko. Sub la premiso de plenumiĝo de la plernoprogramo difinita de la ŝtato, en iuj lernejoj oni instruas fremdan lingvon al la lernantoj de la unua klaso kaj alian fremdan lingvon en ilia studado en supera mezlernejo; en aliaj lernejoj estas instruata la kurso de komputoro, por ke la lernantoj posedu bazajn sciojn pri softvaroj kaj hardvaroj en lernado de mezlernejo.

Por atingi la celon multaj lernejoj sin ekipis per spertaj instruistoj. La 46 instruistoj, inviti-

taj de Jinghua-lernejo, diplomigis el universitato kaj havas riĉajn spertojn en instruado. Multaj lernejoj ne ŝparas monon por inviti emeritajn aŭ enoficajn altnivelajn instruistojn. La proporcio inter instruistoj kaj lernantoj estas 1:5 en privataj lernejoj kaj tiu en la ŝtataj lernejoj — 1:10.

Privataj lernejoj ankaŭ havas avantaĝojn en instrumetodo kompare kun la ŝtataj. Ekz., la nombro de lernantoj en unu klaso estas malgranda, tio faciligas la gvidadon kaj provadon de instrumetodoj far instruistoj. En Jinghua-lernejo pupitroj en kelkaj klasĉambroj estas aranĝitaj laŭ la maniero de eksterlando. En leciono lernantoj povas sidi runde kaj fari diversajn instruajn ludojn. Tiu instruado pli taŭgas por la unuaklasaj lernantoj.

Kompreneble, ankaŭ komfortaj vivkondiĉoj kaj avangardaj instalaĵoj allogas lernantojn. En la lernejoj Guangya kaj Jinghua estas instalitaj komputora ĉambro, planejo, gimnastejo, televida reto kun fermita cirkvito kaj klimatisilo. En la lernejoj servas vartistinoj kaj nutradistoj. Iuj lernejoj donas al la lernantoj, krom tri

manĝoj, ankaŭ etmanĝaĵojn kaj fruktojn. Tio estas ordinara por la evoluintaj landoj, tamen tre malmultaj lernejoj en la nuna Ĉinio havas tiajn kondiĉojn.

Privataj lernejoj estas bonvenaj al publiko, kaj samtempe kritikataj de ĝi, ĉar la lernokotizo de la privataj lernejoj estas ĝenerale multe pli alta ol tiu de la ŝtataj aŭ kolektivaj. La kapitalo por funkciigi privatan lernejon venas ĉefe el la investado far privataj entreprenistoj kaj familietroj de lernantoj. La lernokotizo de Jinghua-lernejo por ĉiu lernanto estas 13 500 juanoj ĉiujare kaj antaŭ ol viziti la lernejon, oni devas pagi krome 30 000 juanojn kiel la eniran kotizon. Por plejparto de la ĉinaj salajruloj la monsumo estas astronomia cifero. Nur tre malmultaj familioj povas elteni tiel altan elspezon. En tiuj familioj estas privataj entreprenistoj, oficistoj laborantaj eksterlande, respondeculoj de kompanioj aŭ entreprenoj, administrantoj de altaj scienc-teknikaj entreprenoj k.a. En la okuloj de iuj personoj la privata lernejo estas "lernejo de nobeloj". Iuj eĉ timas, ke tiuj bonhavaj infanoj fariĝos novaj "nobeletoj" de Ĉinio.

Ĉina koncerna respondeculo definitive montris, ke la ĉina registaro ne aprobas nek sankcias funkciigon de lernejo, kiu celas elkulturi nobelojn. Por eviti tion iuj privataj lernejoj alprenis konvenajn rimedojn. Ekz. Guangya-lernejo ĉiutage faras ceremonion de flaghisado. En la ceremonio la lernantoj parkere legas la ĵuron: "Mi estas ĉino. Mi amas Ĉinion. Mi faros mian patrion pli bela kaj pli forta..." Iuj lernejoj organizas la lernantojn por labori en fabriko aŭ kamparo, kun la celo kulturi en ili laboremon kaj ŝparemon.

La privata lernejo denove aperis en Ĉinio antaŭ nelonge, tamen ĝi pruvis la fakton, ke funkciigi lernejon diversmaniere estos nepra elekto por Ĉinio. ■

Tetrinkejoj en Chengdu

Fotoj de LING YOUJUAN

Oni diras: "Drinkejo estas la plej bona loko por koni Parizon." Por koni Chengdu, iru al ĝiaj tetrinkejoj.


Chengdu estas konsumata urbo. Antaŭe, iuj senlaboruloj vizitis tetrinkejojn por pasigi tempon, kaj plejparto de la frekventantoj estis laboristoj, kiuj venis post laboro por ripozi. Por ordinaraj civitanoj, tetrinkejo funkcias kiel "provizora oficejo", "akceptejo", "oficejo por solvi civilan konflikton", scenejo por prezenti kant-rakontojn.

Ĉie en Chengdu videblas tetrinkejoj, ĉu ĉe stratoj, ĉu en parkoj, ĉu apud riveroj. Kvankam aperis en la lastaj jaroj nemalmultaj karaokejoj, luksaj drinkejoj, kafejoj kaj aliaj novaj amuzejoj, tamen ilin frekventas nur iuj konsumantoj alte salajrataj, dum ordinaraj civitanoj vizitas ankoraŭ tiujn antikvajn tetrinkejojn. Precipe emeritaj oficistoj kaj laboristoj preferas tetrinkejojn, ĉar ĝi ebligas al ili konatiĝi kun multaj amikoj.




Renkontiĝo en tetrinkejo

Alilandaj klientoj



Maljuna kliento de tetrinkejo





Kartoludo en tetrinkejo

Rendevuo



Por purigi Suzhou-riveron

Suzhou(Suĝoŭ)-rivero, kiu trafluas Ŝanhajon, estis grava akvo-fonto por ŝanhajanoj kaj nomata de ili patrina rivero.

Sed kun la disvolviĝo de industrio en Ŝanhajo, pli kaj pli multe da malpura akvo enfluas Suzhou-riveron, kiu nigriĝas kaj malbonodoras. Tio montras, ke nepre necesas purigi la riveron.

En la lasta duonjarcento multaj prudentuloj klopodis por plene solvi la problemon, sed vane. En la 50-aj jaroj en Ŝanhajo laboris riverpuriga grupo, kiu ellaboris du projektojn. Sed tiam, la ĵus fondita nova Ĉinio alfrontis multajn problemojn pli urgajn ol purigo de la rivero, sekve la purigo prokrastiĝis. Fine de la 60-aj jaroj la Ŝanhaja magistrato refoje metis la purigon sur la tagordon de sia laboro kaj konstruis du kanalojn por konduki sesonon de la ellasita akvo de la urbo al Yangzi-rivero aŭ al antaŭurbo por irigacii la tieajn 6 700 hektarojn da kampoj. Suzhou-rivero iom puriĝis, sed en Ŝanhajo aperis nigra-akva kanalo, ke la kampoj kaj putoj estis poluciitaj. Fine la magistrato devis elspezi grandan monsu-


mon por konstrui subteran kanalon.

La 25-an de aŭgusto 1988 inaŭguriĝis la grandioza konstruo por kunfluigi kaj ellasi malpuran akvon. Ĝi estis la unua konstruo de Ŝanhajo, kies entreprenado estis farata per kredito de la Monda Banko kaj en maniero de internacia invito de kontrakto-propono. La unuaperioda konstruado komenciĝis de Danba-strato de Putuo-distrikto okcidente kaj finiĝis ĉe la malpur-akva ellasejo de Yangzi-rivero en Zhuyuan (Ĝujuan) de Pudong-distrikto oriente, kun totala longo de 33.39 km. Uzante la siatempan tubaron por kunfluigi kaj ellasi malpuran akvon en la malnova urboparto, la konstruantoj devis subterigi gigantan tubon por defluigi la akvon ellasitan en Suzhou-riveron. Post simpla traktado la defluigita akvo enfluas Yangzi-riveron. La investo por la tuta konstruo estis 1.6 miliardoj da juanoj, inkl. 145 milionoj da usonaj dolaroj pruntitajn de la Monda Banko. La konstruo servas al 2.55 milionoj da loĝantoj en regiono de 70.57


kvadrataj kilometroj, kun 44 akvo-ellasejoj kaj 52 akvo-defluigaj pumpstacioj, kaj ĉiutage estas defluigitaj 1.4 milionoj da kubmetroj da malpura akvo. En la unuaperioda konstruado estis rekonstruitaj 44 pumpstacioj, starigitaj ok novaj, subterigitaj la giganta tubo longa je 33.39 km kaj interligitaj tuboj kun longo de 20.48 km kaj konstruitaj antaŭtrakta fabriko de malpura akvo kaj Pengyuepu-(Pengjuepu)-pumpstacio.

La granda mediprotekta konstruado estas senprecedenca en Ĉinio. Ĝin partoprenis fakuloj el Germanio, Japanio kaj Britio kaj preskaŭ dek mil konstruantoj el kvin provincoj de Ĉinio. La tuta konstruado iris subtere, kun malfaciloj neimageblaj. Kiel diris s-ro Zheng Xiang (Ĝeng Ŝjangu), ĉefdirektoro de la konstrua kompanio, la iradon de la konstruo decidis kaj la ĉielo kaj la tero. Pluvo povis prokrasti la laboron kelkajn tagojn. Se grundo estis bona, estis facile bori ĝin je dek metroj en unu tago; se ne, estis malfacile bori ĝin eĉ je malpli ol unu metro en unu semajno.

Pengyuepu-pumpstacio



Akvokonduka tubo de Huangpu-rivero



La konstruado iris sub Suzhou-rivero. La grundo estis glueca, kaj estis tre malfacile teni la borilon stabile. Cetere, oni devis subterigi 23-kilometran tubon en la urboparto, kiu trairis loĝkvartalojn, trafikajn arteriojn kaj riveron. Plej danĝere estis trairi fervojon ĉe la buŝo de Zhongshan-strato. Ĉiutage pli ol 170 trajnoj trakuras la lokon. Laŭ difino, la sinkeco en la tunel-konstruado nepre ne superu kvar mm ĉiuhore, kaj la totala sinkeco ne superu kvar cm, alie okazos seriozega akcidento. Tial oni alprenis necesajn rimedojn, por ke la tunelo sekure trakuru la fervojon sub la tero, kaj la konstruantoj kreis la rekordon de sinkeco malpli-ol-3-centimetra.

Venkinte multajn malfacilojn, la konstruantoj finis la unuaperiodan konstruadon. Nun ellasita akvo enfluas Yangzi-riveron tra la giganta tubo. Iuj opiniis, ke Yangzi-rivero estos poluciita. Je mencio pri tio, s-ro Zheng diris, ke la projekto estas multfoje argumentita kaj akceptita de fakuloj. Laŭ la projekto, la ellasejo de malpura akvo distancas de la bordo je 1.5 km kaj oni ellasas ĝin en la profundo je 15 m sub la akvosurfaco. La meznombra flukvanto de Yangzi-rivero estas 30 000 kubmetroj sekunde, kaj tiu de la malpura akvo antaŭtraktita kaj ellasita tra la tubo — nur 16.2 kubmetroj sekunde. Cetere, la du ellasaj tuboj, etentiĝintaj ĝis la centro de la rivero, havas V-formon. Sur la 363-m-longa

parto de ĉiu tubo ĉe la fino staras 20 tubetoj, ĉiu kun 14-16 ŝprucigiloj, tiel la malpureco de la akvo povas reduktiĝi centoble kadre de 1-3 kvadrataj kilometroj en la rivero.

Antaŭ cento da jaroj angloj dediĉis 50 jarojn por purigi Thames-riveron. Supozeble, Suzhou-rivero tute puriĝos almenaŭ en la komenco de la venonta jarcento. Sed tamen la ŝanhajanoj jam decidis projekti pli grandan konstruon, inkl. reformadon de la akvoellasa sistemo de la fabrikoj ĉe Suzhou-rivero, forigon de la ŝlimo funde de la rivero kaj duaperiodan konstruon, kun investo de kvin miliardoj da juanoj, kaj tiam oni povos ellasi ĉiutage 1.7 milionojn da tunoj da malpura akvo. ■

Monkolekto por Fondaĵo EPĈ-abono

Pro altiĝo de la kostoj de eldonado kaj sendado de "El Popola Ĉinio" ni reguligas de la pasinta jaro la abonkotizon kiel jene: la jara abono (inkluzive de sendokostoj) por la evoluantaj landoj kaj evoluantaj landoj respektive estas 26,00 kaj 14,40 usonaj dolaroj aŭ egalvaloraj valutoj ŝanĝeblaj en usonajn dolarojn. Pro tio la plejmulto de niaj legantoj en la orienteŭropaj landoj, la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj la evoluantaj landoj, kiuj havas grandan malfacilon en ekonomio, ne povas plu aboni nian revuon. La reduktiĝo de abonantoj pli altigis la produktokoston de nia revuo kaj devigis nin malpliigi ekde ĉi tiu numero la kolorajn bildojn. Ĉi tie ni petas de niaj legantoj komprenecon kaj pardonon.

Konsiderante ilian fortan

deziron daŭre legi nian revuon, ni decidis establi FONDAĴON EPĈ-ABONO, per kiu ni pagos la abonkotizon por iuj malnovaj legantoj kaj esperantistaj aktivuloj de la supre menciitaj landoj. Ni elprenos parton de la rentumo de Ghiselin-Fondaĵo de "El Popola Ĉinio" kiel bazan monsumon de FONDAĴO EPĈ-ABONO. (Tio tute konformas al la deziro de la belga samideano Charles Ghiselin, kiu testamentis, ke lia heredaĵo al EPĈ estu uzata por disvolvo de Esperanto.) Samtempe ni kore petas, ke esperantistoj de la landoj kun bonaj ekonomiaj kondiĉoj monofere al FONDAĴO EPĈ-ABONO por helpi la nepagipovajn samideanojn. Bonvenas eĉ malgranda sumo. Ni ĉiujare aperiĝos en nia revuo la nomon kaj ofersumon de ĉiuj donacintoj. Helpemuloj bonvolu sen-

di monon (usonajn dolarojn aŭ valutojn ŝanĝeblajn en usonajn dolarojn) al la konto A/C No. 71411749 je la nomo From People China (El Popola Ĉinio) ĉe Bank of China (Banko de Ĉinio). La adreso de la Banko de Ĉinio estas: Fuchengmennei Dajie, CN-100818 Beijing, Ĉinio. Sendante monon, bonvolu sciigi al ni pri la celo de la oferita mono kun kopio de la banka ĉeko. Oni povas sendi ankaŭ monbiletojn (usonajn dolarojn aŭ valutojn ŝanĝeblajn en usonajn dolarojn) rekte al ni en registrita koverto. La adreso estas: El Popola Ĉinio, P.O. kesto 77, CN-100037, Beijing, Ĉinio.

Antaŭdankon pro via konsidero kaj monofero al FONDAĴO EPĈ-ABONO!

La Red.

JIA YI PRI VIVO KAJ MORTO

Jia Yi (Ĝja Ji) (200-168 a.K.) estis erudicia filozofo kaj literaturisto de Ĉinio. Li laboris iam kiel gubernisto de kronprinco. Iutage de la somero de 174 a.K. strigo enflugis en la domon de Jia Yi. Laŭ superstiĉa vidpunkto, tio estas malbona aŭguro. Cirkulis la diro: "Sovaĝa birdo flugas en domon, ĝia mastro perdos sian vivon." Jia Yi ne kredis tion kaj verkis la jenon por montri sian vidpunkton pri vivo kaj morto.

Ĉio en la naturo ŝanĝiĝas senĉese.

Ĝojo akompanas malĝojon, feliĉo malfeliĉon.

Oni nepre mortos kaj transformiĝos,
Kial do timi la postmortan transformiĝon?

Malvirtulo mortas pro oro,
Virtulo pro honoro.

Ambiciulo mortas pro potenco,
Plebano laboras pro vivo.

Noblulo forgesas ĉion ekster si,
Restante ekskluzive ĉe justeco.

MEM PROVU

KAPKUSENO POR BEBO

La aspekto de la kapo de bebo koncernas kapkusenon, ĉar bebo kuŝas en lito ĉirkaŭ 20 horojn ĉiutage. Iuj gepatroj mem faras kapkusenon por ĝi el sekigitaj eluzitaj te-folioj. Ili faras kapkusenon 35 centimetrojn longan, kun duonovalaj finoj, remburante ĝin per la te-folioj. Tia kapkusenado estas moleta kaj aerotralasa, tial ĝi povas doni belan aspekton al la kapo de bebo kaj somere povas protekti la haŭton de bebo kontraŭ ruĝaj jukigaj ŝvelaĵetoj.

BELIGO DE VIZAĜO

Se vi havas pufajn lokojn sub la okuloj, metu kuleron da salo en ujon kun ĉirkaŭ unu litro da varma akvo, kirli la akvon, trempu sterilizitan vatbulon en ĝi kaj fomentu la pufajn lokojn per la bulo. Kiam malvarmiĝas la bulo, ripetu la trempadon kaj fomentadon. Kaj post kelkaj tagoj viaj pufoj malaperos.

ELSPIRADO MILDIGAS HEMIKRANION

Hemikranio estas kaŭzita de tro da oksigeno en cerbo. Kiam hemikranio ekatakas vin,

kovru viajn nazon kaj buŝon per konusa papera saketo aŭ plasta saketo (iom aerotralasa) kaj kiel eble plej profunde elspiradu en la saketon por redukti oksigenon en via cerbo. Post plurfoja elspirado mildiĝos aŭ malaperos via hemikranio.

ARAKIDAJ GRAJNOJ KURACAS STOMAKAN DOLORON

Iujn atakas stomaka doloro ofte pro malvarma vento. Se ili manĝas 100 gramojn da arakidaj grajnoj rostitaj, kuiritaj aŭ nekuiritaj, la doloro mildiĝos aŭ malaperos.

FROTO DE PLANDOMEZO KURACAS SENDORMECON

Kiam vi kuŝas en lito kaj ne povas endormiĝi, metu la plandon de via piedo sur la dikfingron de alia piedo kaj ir-reire frotu per la dikfingro la plandomezon ĝis ĝia varmiĝo. Alternigu la piedojn. Dum la ekzercado via atento certe absorbiĝos sur la piedoj, kaj iom post iom vi laciĝos kaj sentos dormemon. Persista ekzercado povas protekti la sanon.

KAMPARANOJ ĜUOS BONHAVAN VIVON

Enketo montras, ke laŭ kalkulo surbaze de la rapideco de la progreso de la kampara ekonomio en la pasintaj jaroj, la sintezaj bonhavaj poentoj de Guangdong-provinco de Ĉinio atingis 90.06 en 1994, kio markis, ke la kamparo de Guangdong ĝenerale efektivigis la ŝtatan normon de bonhava vivo.

La normo de la kampara bonhava vivo estis ellaborita surbaze de takso en ses flankoj, nome enspeza distribuado, produkta medio, spirita vivo, homa kvalito, materia vivo kaj socia asekuro kaj sekureco. Laŭ la kalkulo farita laŭ la normo de la tutlanda kampara bonhava vivo ellaborita de la Ŝtata Statistika Buroo, la kamparo de Guangdong jam iris 85% de la vojo en 1993 dum la transiro de minimuma vivnivo al bonhaveco.

La kamparo de Guangdong atingis la normon kiel jene:

— La pokapa produktovalorado de la nacia ekonomio fundamente atingis mil usonajn dolarojn.

— La konsumata kutimo radikale ŝanĝiĝis. En aŭgusto de 1993 la vendovalorado de kamparaj konsumoj atingis 3.043 miliardojn da juanoj, je 25.8% pli multe ol tiu en la sama monato de 1992, kaj la kreska rapideco estis pli granda je 3.6% ol tiu en julio. Kalkulo laŭ tio certigas, ke en 1994 la meznombra konsumata nivelo de ĉiu kamparano en la provinco atingos 600 juanojn laŭ bonhava nivelo.

— Senĉese altiĝis la eduka kvalito kaj la nivelo funkciigi lernejojn kaj ĝeneraligi edukadon kaj la reformado de la eduka sistemo akiris evidentan sukceson. En 1990 la provinco efektivigis ĝeneraligon de naŭjara deviga edukado, kaj la nombro de elementlernejoj, kiuj povis daŭrigi lernadon en mezlernejo, kreskis de 85.75% en la lasta periodo de la okdekaj jaroj al 96.7%.

— 34.94% de la loĝantaro de la kamparo ĝuas kooperan kuracon, kaj 69.17% de la vilaĝoj havas sanitarejon.

La rapide multiĝantaj vilaĝaj entreprenoj, kies jara produktovalorado superas cent milionojn da juanoj, estas la ĉefa forto por altrapida disvolviĝo de la ekonomio de la kamparo de Guangdong.

KIEL ONI PROTEKTAS LA TERAKOTAJN MILITISTOJN KAJ ĈEVALOJN DE QIN-DINASTIO?

Antaŭ kelke da tempo iuj ĉinoj kaj eksterlandanoj diris, ke pro manko de necesa protektado la elterigitaj terakotaj militistoj kaj ĉevaloj ekhavis skvamecajn pecetojn, kiuj defalis de la figuroj, kaj la supraĵo de la figuroj fariĝis malpure griza. Sed fakte ĉinaj arkeo-

lojoj faris tre detalan esploron kaj multe sukcesis en protektado de la koloroj sur la figuroj kaj en firmigo de septoj en la kavego de figuroj, kaj trovis bonan metodon por protekti la figurojn kontraŭ tertremo, humideco kaj erozio. Krome ili konstatis la konsiston de la farboj sur la figuroj en la unua kaj tria kavegoj.

Ili trovis, ke malsamaj estas la farboj sur la terakotaj figuroj de Qin-dinastio ol tiuj de Han-dinastio kaj aliaj periodoj. Post bakado de la terakotaj figuroj oni lakis ilin unu aŭ du fojojn, kaj tian lakon fremdlandaj arkeologoj nomis "ĉina lako". Poste oni farbis la lakitajn figurojn per kolorigiloj el neorganikaj mineralaj materialoj. Specialistoj opiniis, ke la purpura materialo estas kuprobaria silikato. Jen la arkeologoj miris, kial tia kemia komponaĵo akirebla nur per superkondukta tekniko aperis antaŭ 2 200 jaroj. Ĉu ĝi estas artefarita aŭ natura?

Grava sukceso en protekta teorio de terakotaj figuroj metis bazon por protekto de la koloraj desegnoj sur la terakotaj figuroj. La arkeologoj milfoje kaj eĉ dekmilfoje provis pecetojn de la figuroj en diversaj kemiaj likvaĵoj kaj protektaj likvaĵoj kaj fine trovis diversajn kemiajn protektajn metodojn por efika protekto de la terakotaj figuroj de Qin-dinastio.

NE ĈAGRENIĜU PRO KORPULENTECO

"Korpulentecon signifas feliĉon", tiu vidpunkto longe influis la homojn. Sed poste oni malsatis korpulentecon. Oni kredas, ke kiom dikiĝos la korpo, tiom mallongiĝos la vivo. Sekve furoradis sveltigaj metodoj, ekzemple dieta, medikamenta kaj te-trinka. Kaj en iuj landoj aperis specialaj maŝinoj por sveltigado. Sed ili ne tiom efikis. Do la dikuloj dronis en ĉagreno.

Lastatempe pli kaj pli multaj homoj dubis pri la konsekvenca rilato inter korpulentecon kaj malsano, kaj iuj eĉ asertis, ke korpulentecon povas longigi la vivon.

Ĝenerale oni opinias, ke kormalsano kaj hipertensio konsekvence rilatas kun korpulentecon. Sed usonaj medicinistoj faris enketon pri la rilatoj inter vivdaŭro kaj korpulentecon de 6 milionoj da homoj en Usono kaj aliaj 16 lokoj de la mondo. La rezultato de la enketo estis, ke modere korpulentaj homoj vivas pli longe.

En la suda Pacifiko estas Tongo, kie oni rigardas korpulentecon kiel belecon. Oni dufoje faris enketon pri grandaĝuloj en Tongo kaj trovis, ke la homoj, kiuj pezas pli ol cent kilogramojn, havas normalan sangopremon, kaj apenaŭ trovis suferantojn de plenkreskula kormalsano. Eble tio dependas de la dieto, kiu akcentas bataton kaj malkonsilas animalan proteinojn.

Sendube troa korpulentecon ne estas bona afero, ĉar ĝi malfaciligas homan agadon, sed kiom ĝi damaĝas la homan sanon, tio restos studinda por medicinistoj.

EKONOMIO

● La Ŝtata Statistika Buroo de Ĉinio anoncis, ke la totala produktovaloru de Ĉinio en 1993 superis 3 000 miliardojn da juanoj, je 13.4% pli multe ol tiu en 1992. Pro tio 1993 fariĝis la rekorda jaro de post 1985 en la disvolviĝo de la nacia ekonomio.

● Je la 2-a de marto 1994 la ĉina registaro komencis efektivi grandiozan planon — solvi la problemon de vestado kaj manĝado de 80 milionoj da malriĉuloj dum la lastaj sep jaroj de la kuranta jarcento. La registaro klopodos, por ke la pokapa jara enspezo de preskaŭ ĉiuj malriĉuloj atingu ĉe la fino de la kuranta jarcento 500 juanojn, kalkulate laŭ la konstanta prezo de 1990; intensigos konstruadon de fundamentaj instalaĵoj kaj solvos la problemon de trinkakvo por homoj kaj brutoj en sekaj regionoj; kaj likvidos la postĝintecon de kulturo, eduko kaj higieno.

● Ĝis la fino de 1993 Ĉinio havis 13 000 akciajn entreprenojn, kun akcia kapitalo de 208.632 miliardoj da juanoj kaj 25 milionoj da akciuloj.

● En la lastaj jaroj en Ĉinio pli kaj pli kreskis bezono pri importitaj fruktoj. Por akceli komercon inter Ĉinio kaj Usono kaj kontentigi la bezonon de la ĉina merkato, la Ĉina Biobotanika Kvarantena Instituto post konsulto de koncernaj materialoj konsentis pri importado de pomoj el Vaŝingtonio de Usono.

● Post pli-ol-unu-jara traktado kun dekkelkaj aziaj kaj eŭropaj landoj Ĉinio komencis konstrui sian unuan telekomunikacion fotokablon inter Ŝanhajo kaj Frankfurto etendiĝantan tra 11 landoj, kun totala longeco de 16 000 kilometroj. La kablo ekfunkcios en la unua trimestro de 1996.

● Laŭ takso de la Ŝtata Informo-centro de Ĉinio, en la venontaj jaroj ĉinoj elspezos ĉefe por aĉeti loĝdomojn, personaŭtojn kaj mikrokomputerojn, havigi al si telefonojn, plibonigi sian sanon kaj tiun de siaj familianoj, klerigi siajn infanojn kaj aĉeti akcion kaj valorpapirojn kontraŭ sia ŝparkaso.

● La rafinejo de Golmud, Qinghai (Ĉinghaj)-provinco, estas tiu plej alta super la marnivelo en la mondo. Ĉiujare ĝi produktas 700 000 tunojn da benzino kaj dizel-

oleo de altaj normoj. Ĝia apero finis la historion, ke Qinghai kaj Tibeto dependas de aliaj provincoj pri industria brul-oleo.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

● La satelito Shijian n-ro 4, kiun oni lanĉis je la 8-a de februaro 1994 en la satelit-lanĉa centro Xichang (Ŝjiĉang), Sichuan-provinco, jam eniris en difinitan orbiton kaj sendis plasmajn datenojn el la spaco. Bone laboras ĉiuj ĝiaj esploraj instrumentoj. Tio metis bazon por lanĉi ĉi-jare praktikan sateliton per forta ĉina transporta raketo aŭ lanĉi malgrandan scienc-esploran sateliton per eksperimenta raketo.

● Ekde decembro 1993 oni longe komparis en Aŭstralio hidrogen-atoman horloĝon faritan de la Ŝanhaja Observatorio kun usona atoma horloĝo kaj post la testo oni trovis, ke ĝi bone funkcias kaj havas ekarton de nur unu sekundo en 10 milionoj da jaroj. Kiel preciza kaj frekvenca norma tempo-mezurilo, ĝi estas nemalhavebla por naci-defenda laboro kaj scienca esplorado.

KULTURO KAJ EDUKO


● La terurveka rakonta filmo "Nebula Loĝejo" reĝisorita de fama ĉina reĝisoro Huang Jianzhong (Hŭang Ĝjangong) prezentas rakonton naskitan surbaze de intrigo pri batalo pro heredaĵo: iu geedza paro revenis de miela vojaĝo al sia profunda loĝejo, kie sinsekve okazis strangaĵoj. Komence la edzino pensis, ke tio estas ŝiaj iluzioj, kaj poste ŝi ektimis memorante, ke ŝia patrino terurigis pro tio kaj sin mortigis. La afabla edzo venigis kuraciston al ŝi, kio vekis suspekton ĉe ŝi... S-ro Huang diris, ke la filmo estas la unua komerca filmo, kiun li reĝisoris, kaj oni faris novajn provojn de lumino kaj akustiko. Estas la unua fojo, ke oni produktis tian ĉina-alilandan filmon kiel "Nebula Loĝejo" faritan en la lasta periodo de kompletigo en Ĉinio. La metodo estis aprobita de la ŝtata filmo-instanco kaj estas ekpraktikata kiel sistemo.

● Dum la pasintaj kvar jaroj, kiam oni praktikis la projekton "Espero" cele venigi al lernejoj tiujn ĉinajn geknabojn en la malriĉaj regionoj, kiuj devigite ĉesigis sian lernadon, kaj plibonigi iliajn lernokondiĉojn, ĉinaj soci-tavoloj kaj civitanoj faris mondonacojn en diversaj manieroj. Antaŭ nelonge Xiyuan(Ŝjijŭan)-hotelo de Pekino proponis, ke unu familio monhelpu unu lernanton, kaj al tio tuj venis respondo de pli ol mil ĝiaj oficist(in)oj kaj servist(in)oj. Krome, tiu kvar-stela hotelo de-



Mondonacado en la hotelo Xiyuan

Sceno el "Nebula Loĝejo"



cidis fondi elementan lernejon "Espero" per la mono dediĉita al la festado de la 40-jariĝo de la hotelo.

La projekto "Espero" jam helpis 540 000 geknabojn reviziti sian lernejon.

● Antaŭ nelonge konstruiĝis en la svisa urbo Zuriko ĉinstila ĝardeno donacita de la amika urbo Kunming de Ĉinio.

La ĝardeno kun areo de 3 380 kvadrataj metroj situas oriente de la lago de Zuriko. Ĝiaj kioskoj,

pavilonoj, pontetoj, riveretoj kaj artefaritaj montetoj estas en la antikva stilo de tiuj de Kunming, kaj krome oni ankaŭ plantis en ĝi belajn florojn kaj arbojn kaj starigis kolorajn bildojn. Tio ricevis laŭdon de la magistrato kaj loĝantoj de Zuriko.

● Lastatempe en Yonghegong-templo de Pekino okazis remalfermo de la 240-jara budhostatuo Majtreja.

La statuo farita el blanka santal-ligno kun alto de 26 metroj kaj diametro de 8 metroj estas rara budhisma trezoro, enskribita en "Guinness" en 1990.

ARKEOLOGIO

● Marte ĉinaj arkeologoj komencis fosi la duan kavon de terakota legio ĉe la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin(Ĉin)-dinastio en Xi'an (Ŝji'an), Shaanxi(Ŝenŝji)-provinco, konata kiel la oka miraklo de la mondo. Oni konstatis, ke en la kavo estas pli ol 1 400 terakotaj militistoj, ĉevaloj kaj ĉaroj en variaj dispozicioj, de kategorioj infanteria, kavaleria, ĉara kaj pafarka, kiuj konsistigas la plej eminentan parton de la terakotaĵoj. La arkeologoj finos la fosadon post 5-7 jaroj aŭ pli longa tempo.

MIRINDAĴOJ

● Ĉe la sudokcidenta piedo de la Granda Xing'an(Ŝing'an)-montaro oni trovis mirindan fonton de minerala akvo, kun perimetro de 15 kvadrataj metroj. La fonto havas ses aperturojn, kiuj elŝprucigas akvojn respektive amaran, pikan, acidan, dolĉan, adstringagustan kaj salan. Post ekspertizo fakuloj konstatis, ke la fontakvo estas bonkvalita minerala akvo kun litio, stroncio kaj metasilicia acido.

● Ĉina oficiro Wu Gongrang konservas Yuhua-ŝtoneton el Yangzi-rivero, delikatan, laktoblancon, kun longeco de 4 centimetroj kaj larĝeco de 2.5 centimetroj. Meze de la ŝtoneto prezentigas natura viola ĉina mapo kun apenaŭ videblaj figuroj de Bohai-golfo, Liaodong-duoninsulo kaj la insuloj Taiwan kaj Hainan. Oni nomas ĝin "Ŝtona Ĉina Mapo".



S-ro Fu Weici en ordigado de moneroj

AMATOROJ

Kolektanto de moneroj

Teksto de LI QIANG

Fotoj de LIU SIGONG

ESTAS ordinara malnova loĝejo en Pekino. Tie loĝas s-ro Fu Weici, fama kolektanto de diverslandaj moneroj.

La 70-jara s-ro Fu estas emerita profesoro de la Pekina Lingva Instituto. Instruinte kelkdek jarojn, li havas multajn lernantojn kaj tradukis en la ĉinan lingvon multajn famajn verkojn, ekz. "Buddenbrooks" de germana verkisto Thomas Mann, "Regato" de germana verkisto Heinrich Mann, "Kerno de la demando" de brita verkisto Graham Greene kaj "La luno kaj ses pencoj" de brita verkisto William Somerset Maugham.

10 jarojn post sia emeritiĝo, s-ro Fu sin ekokupis je tute nova kampo, t.e. kolektado de diverslandaj moneroj. Estante maniulo je tio, tage li aŭ serĉas monerojn en monera foiro aŭ interŝanĝas ilin kun aliaj kaj vespere li sub lampo ilin bonordigas, aprecas kaj studas. Ifoje li tradukas materialojn eĉ ĝis profunda nokto por certigi pri la emisia jaro kaj monunuoj de la koncernaj moneroj.

Kial lin tiel forte interesas la moneroj? S-ro Fu rakontis al mi:

Antaŭ kelkdek jaroj, iu 13-jara knabo trovis en tirkesto kelkajn monerojn, kiujn lia patro alportis el alia lando. Sur ili vidiĝis laboristo, kiu forĝas feron. Ili vekis ĉe la knabo scivolemon kaj de tiam li maniuliĝis je kolektado de moneroj de diversaj landoj. Li serĉadis diverslandajn monerojn en budoj de malnovaj objektoj de la malnova Pekino. Kun tempopaso la de li kolektitaj moneroj pli kaj pli multiĝis. Kiam li finis sian lernadon en mezlernejo, li jam havis ĉ. 600 monerojn el ĉ. 60 landoj. Kvankam poste liaj trezoroj perdiĝis, tamen lia manio sin kaŝas ĉiam en lia koro.

La knabo estas s-ro Fu.

Montrante al mi maldikan kajeron, sur kies kovrilo legiĝas: "Miaj Karaj Moneroj", s-ro Fu diris al mi: "Jen miaj notoj pri moneroj kolektitaj de mi kiam mi estis 16-17-jara." En la kajero troviĝas kopioj de novaj kaj malnovaj moneroj el pli ol 20 landoj kun simplaj klarigoj.

El ili estas kopio de malgranda arĝenta monero je 50 centimoj de Eritrea en 1890 kun klarigo sube: "Eritrea, provinco de Etiopio, situas ĉe la Ruĝa

Maro. Ĝi estis okupita de Italio en 1890. Sur la monero vidiĝas portreto de reĝo Betto la Unua de Italio." S-ro Fu sciigis al mi, ke li dediĉis grandan atenton al kolekto de moneroj de diversaj koloniaj landoj en la historio. Nun li havas 500 monerojn de preskaŭ ĉiuj kolonioj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko, sed li ne plu trovis la supre menciitan arĝentan moneron de Eritrea. En 1993, s-ro Fu loĝis 4 monatojn en Britio, kvankam li ofte vizitis moneran foiron, li ne sukcesis trovi tian moneron. Li diris kun bedaŭro: "Mi ja ne memoras, kiamaniere mi trovis tiun moneron."

Invitite, s-ro Fu laboris en 1980 kiel profesoro en Han-lingva Centro de Bochum, Germanio. Poste li plurfoje laboris en aliaj landoj, faris viziton tie kaj akumulis iom post iom multe da moneroj. Tio de nove vekis ĉe li la junecan emon. Tial li de nove vigliĝis en kolekto de la moneroj, frekventis monerajn foirojn, amikiĝis kun kolektantoj de moneroj,... Nun li jam havas pli ol 5 000 monerojn antikvajn kaj cirkulantajn en pli ol 200 landoj kaj regionoj. Lia granda ŝranko pleniĝis de dikaj kajeroj pri moneroj.

S-ro Fu diris al mi, montrante la monerojn: "Ili havas historion de 2 000-3 000 jaroj. Pro siaj malgrandeco kaj daŭreco la moneroj malfacile difektiĝas, tial ili estas gravaj materialoj por studi la politikon kaj kulturon de diversaj landoj en malsamaj epokoj. Kaj plie moneroj estas ankaŭ artaĵoj kaj iliaj belaj bildoj estas delikataj reliefoj."

Parolante pri sia ĝojo en la kolektado de moneroj, s-ro Fu diris: "Ĉiufoje, kiam mi malfermis miajn kajerojn de moneroj, la belaj bildoj kondukas min en buntan universon, kvazaŭ mi estus en afrika dezerto sekvante kamelan grupon, aŭ en Egiptio por viziti mirindajn piramidojn kaj sub kokosarboj en Tuvalu, insula lando en Pacifiko por aŭdi la akvan plaŭdadon. Antaŭ la malgrandaj kupraj moneroj de Somalio, mi kvazaŭ vidus, kiel la somalan popolon turmentas malsato. Rigardante la diajn bildojn sur arĝentaj moneroj de Grekio, mi kvazaŭ vizitus la sanktan templon sur Olimpo. La portretoj de multaj suverenoj sur moneroj malfermis al mi la pordon de diversaj landoj. Mi tre amas la famajn konstruaĵojn, diversajn sovaĝajn bestojn kaj vegetalojn, toteman kolonon de indiĝenoj, agrokulturaĵojn, florojn kaj herbojn sur la moneroj." ■



Arĝentaj moneroj de Egiptio

Arĝenta monero de Anguilla

Gvajanaj moneroj en serio





La ŝtonkavernaro Maijishan

Foto de LIU SIGONG

ISSN 0032-4361



世界语《中国报道》一九九四年第六期

(本刊代号: 二——九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2